

ESPERANTO

INTERNACIA REVUO ESPERANTISTA

N-ro 521

MARTO 1949

NUN HAVEBLA

LETEROJ de L. L. ZAMENHOF

La tragedio de lia vivo rivelita de lia ĵus retrovita korespondo kun la francaj eminentuloj. Prezento kaj komento de Prof. G. Waringhien.

1a volumo, 1901-1906.

388 paĝoj, 21×14.5 cm., bindita.

Prezo 15 ŝil., aŭfranko 9p.

La korespondaĵoj de eminenta homo ĉiam konigas detalojn de vivo, karaktero kaj sentimento de la skribinto tiel ke personaj leteroj kompletigas biografiojn. En tiu ĉi libro ne temas nur pri leteroj de la majstro, sed ankaŭ pri tiuj direktitaj al li de francaj gvidantoj de nia ideo en la frua epoko de la movado. Tiu ĉi libro lumigas la pasintecon kaj detruos aron da legendoj.



Mendu ĉe

UNIVERSALA ESPERANTO-ASOCIO

Heronsgate, Rickmansworth, Herts., Anglujo

ANONCETOJ

Kosto : du pencoj por ĉiu vorto, aŭ internacia respondkupono por ĉiu duobla vorto.

Ĉiu anoncanto morale devigas sin respondi minimume unu fojon al ĉiu kiu skribas.

Itallingvo-perfektigemuloj plensukcesos ! Legu Jarlibron 1948 p. 153 ; 1949 paĝ. ?

Ĉu ni daŭre perdadu la fruktojn de nia laboro ? Tezo diskutenda de ĉiu E-grupo. Mendu, sendante 2 intern. respondkuponojn, ĉe Esperantista Klubo, Teplice, Ĉeĥoslovakujo.

Crispiniano Rosa, "Diamang", Dundo, Lunda, Angolo, deziras tutmonde interŝanĝi poŝtmarkojn novajn kaj uzitajn.

Carlos Jesus, "Diamang", Dundo, Lunda, Angolo, deziras korespondi kun gesamideanoj el Azio pri ĉiuj temoj.

Filatelistoj ! Serioza interŝanĝado kun ĉiuj eŭropaj landoj dezirata. Kataloga bazo : Zumstein. Reciproke nur bonkvalitoj. Redaktoro G. A. Johansson, Granskagatan 3 A, Skövde, Svedujo.

Junaj leĝrompantoj. Informon pri oficiala traktado en ĉiuj landoj deziras F. O. Bevan, 1 Windsor Road, Farnborough (Hants.), Anglujo.

24 diversaj gekursanoj, komencantoj, deziras korespondi kaj interŝanĝi p.m. Skribu al la kursgvidanto : S-ro Jaromír Pavlacký, Veselí nad Moravou, Ĉeĥoslovakio.

Deziras korespondi tutmonde per ilus. kartoj eĉ leteroj—en Esperanto—English—Español—Français—Deutsch. Certe respondos. 26-jara S-ro Miguel Simecek, Hotel Nutibara, Room 15-11P, Medellín, Kolombio, Sud-Ameriko.

Leteresperon aranĝos dum aprilo Esperantogrupo Münchberg-Ofr, Germanujo. Skribu multnombre ! Nepra respondo.

Atentu atenteme—Ĉu vi volas, pacamantoj, ricevi ĉiusemajne senpagan efikan literaturaĵon ? Skribu al The Universal Publishing Assn., Mt. Carmel Center, Waco (Texas), Usono.

Filatelistoj en ĉiuj landoj ! Ĉu vi estas fervoraj kolektantoj ? Bonvolu peti informojn pri Madejra Filatela Klubo. Skribu multnombre al pres : D-ro J. C. Tavares da Silva, Rua do Aljube 49, Funchal, Madeiro.

La V-a Argentina Esperanto-Kongreso okazos dum la Pasko, 1949-a. Ĉiuspecaj korespondaĵoj petataj por dumkongresa granda ekspozicio. Respondo garantiata al ĉiu sendaĵo. Ĉio alvenu ĝis la 11a de Aprilo al la L.K.K., ĉe Rosaria Esperanto-Asocio, Corrientes 917, Rosario, Argentino.

Ne-katolikoj, kiuj deziras informojn pri la katolika religio, povas ricevi ilin senpage de la Internacia Katolika Informejo, Fraterhuis, Loonopzand, Nederlando.

Poŝtkartesperon aranĝos Esperantistoj el urbo Ostrava-Hulváky komence de Aprilo. Skribu al S-ro Zdeněk Samek, Čajkovského 41, Ostrava-Hulváky, Ĉeĥoslovakujo.

Korespondadi precipe pri ciganaj aferoj deziras Prof. Petro Turi-Kováts, Homok-str. 7, Győr, Hungarujo. Anonco ĉiam validas.

Onnik Sogomonian, Dr. Nider 5, Burgas, Bulgarujo, deziras korespondi kun filatelistoj en esperanta, itala, kaj germana lingvoj.

S-ro Raymond Thompson, 8 Cavan Street, Cootehill, Co. Cavan, Irlando, deziras interŝanĝi poŝtmarkojn kaj gazetojn. Certe respondos.

Leteresperon por la gekursanoj-komencantoj aranĝos Katolika klubo je la fino de Marto kaj komenco de Aprilo. Certe respondo—Ankaŭ al Germanoj. Adreso. S. P. Duin, A. L. Dijserinckstr. 58, Haarlem, Nederlando.

Frostigad-Inĝeniero deziras korespondi kun tiaj inĝenieroj en aliaj landoj. James Partington, 12, Singleton Avenue, Brightmet, Bolton (Lancashire), Anglujo.

Interŝanĝo. Al tiu kiu sendos al mi 50/200 malsamajn poŝtmarkojn de sia lando, mi sendos egalan kvanton de la mia. Mi ankaŭ sendos madejrajn poŝtkartojn kontraŭ poŝtmarkoj. Jorge Aurélio Rodrigues, Caixa postal 193, Funchal, Madeiro.

Leteresperon aranĝos 30 membroj de vigla grupo la 1an de Majo. Skribu multnombre. Respondo garantiata : Esperanto-Grupo (16) Bad-Hersfeld, Lambertstr. 3, Germanujo.

Humberto M. Teixeira, Rua Dr. Bittencourt Rodrigues 176, São Paulo, Brazilo, deziras korespondi pri Esperanto kaj Spiritismo kun tutmondo.

Korespondado—Deziras korespondadi kun ĉiuj landoj, PI kaj PM, S. Joŝihuŝi, Kougimaĉi 28, Kanazaŭa, Japanujo.

Diversaj gelernantoj de la E-kurso aranĝos leteresperon fine de Marto. Skribu tuj kaj multnombre al Esperanto-klubo, Novy Bor, Ĉeĥoslovakujo.

Leterespero komence de Aprilo. Niaj klubanoj kaj kursanoj deziras korespondi kun la tuta mondo. Herbert Levi, Esplanaden 21, Kalmar, Svedujo.

S-ino M. Mondeška, Nansen 29, Sofia, Bulgarujo : korespondado, interŝanĝo tutmonde.

Junaj instruistoj volas korespondi kun fraŭlinoj tutmonde. S-ro P. Himanka, Seminaari, Kajaani, kaj S-ro Herkko Järvinen, Eräkatu, 1, Kajaani, Finnlando.

Esperanto-Servo-Mainz, gvid. P. Becker, komerca fakdelegito de U.E.A., Mainz-Weisenau, Bleichstr. 21, fr. zono, Rheinland-Pfalz. Mainz estas la centro de la germana vinkomerc. Pruvu la praktikan valoron de nia kara lingvo. Postulu prezarojn.

Homstuda Revuo. Gazeto por Etnografio kaj Lingvoj, provizore kvaronjara. Jarabono 1 dol. usona. Provnumero 1 resp.-kup. American Esperanto Institute, New Auburn, Wis., Usono.

Por kuraĝigi miajn 20 ĉiuaĝajn gelernantojn mi deziras korespondantojn kaj ilustritajn poŝtkartojn el ĉiuj landoj. Antaŭdankon. Skribu : Pierre Berlot, Esperanto-kurso 10 Rue Paul Baudry, Paris, Francujo.

La studrondo por komencantoj aranĝos leteresperon en la monato aprilo 1949. Ankaŭ filatelistoj partoprenas la kurson. Adreso : Gunnar Karlsson, Vetlanda Sängindustri, Småland, Vetlanda, Svedlando.

Leteresperon aranĝos Societo de Okcident-Londonaj Esperantistoj en aprilo. Nepra respondo. Adreso : 11, Colville Road, London, W.3, Anglujo.

Leterespero 20 aprilon. Nepra respondo. Bodø Esperantoklubb, Jentoftsgate 2, Bodø, (nord) Norvegujo.

Domservistino bezonata. Skribu Esperante, angle, germane aŭ ĉeĥe al F-ino M. Maier, 57, Bedford Gardens, London, W.8, Anglujo.

J. Acien Atencia, en Maroko, estas en malsanulejo pro akcidento kaj bedaŭras ke li ne povas skribi al siaj korespondantoj.

Heldera Esperantista Societo "Nova Sento" petas por sia ekspozicio okazonta en Septembro propagandmaterialon. Sendu ĝin al la sekretario : Herzogstraat 40, Den Helder, Nederlando.

ESPERANTO

INTERNACIA REVUO ESPERANTISTA

42a JARA Marto 1949

N-ro 521 (3)

Oficiala organo de
Universala Esperanto-Asocio

Fondinto : H. HODLER

Redaktoro :
HANS JAKOB

Helpredaktoro
MASON STUTTARD

Ĉion por la redakcio sendu al
ESPERANTO
Palais Wilson, Genève, Svis.

Traduko kaj represo de artikoloj
estas permesataj, kondiĉe ke oni
citu la fonton. Por bibliografia
celo oni sendu periodaĵon en kiu
aperas represo el ESPERANTO,
al nia redakcio.

Ĉion pri administrado de UEA
kaj de la revuo ESPERANTO,
abonado, reklamoj, anoncetoj
sendu al

UNIVERSALA ESPERANTO-ASOCIO
Heronsgate, Rickmansworth
Herts., Anglujo

Jara abono : 8 ŝil. anglaj
(kun membreco kaj jarlibro
12ŝ. 6p.)

Ĉefdelegitoj kaj Perantoj en
multaj landoj

Tarifo por reklamoj :

1 paĝo £5 : ½ paĝo 50 ŝil.
½ paĝo 25 ŝil. : ¼ paĝo 12.5 ŝil.

Anoncetoj pri korespondado :

2 pencoj por unu vorto aŭ
1 int. respondkupono por ĉiu
duo da vortoj

Legantoj en 65 landoj

La internacia lingvo kaj ĝia malamikaro

Ideo tiom spirit-revolucia kiom estas la enkonduko de internacia helplingvo sindeza nature renkontas fortan opozicion kaj arigas kontraŭ si ĉiaspecajn malamikojn. Ĉiu kiu aktive laboras por Esperanto spertas tion kaj iuj eĉ malkuraĝigas antaŭ la falango de la malamikoj. Kia estas nun tiu ĉi malamikaro, kiajn argumentojn ĝi havas, kaj kio estas ĝia povo. Ni ekzameniu tiun ĉi aspekton de nia klopodado, ni serĉu ne nur ekkoni nin, sed niajn kontraŭulojn.

Ili estas diversaj, ĉi tiuj malamikoj, ili ne formas firman elementon. Grupigo donas proksimume jenan serion:—Oni estas kontraŭ internacia helplingvo pro motivoj lingvo-mistika, lingva ĝenerale, pro ambicio nacia, pro opozicio al la interfratiga karaktero de la ideo, pro troa konsidero de propraj lingvaj konoj, pro timo ke internacia lingvo ĝenerale uzata laŭgrade malgrandigos lernadon de naciaj lingvoj, sekve forigos materian gajnon, k.a. La malamikecon pro politikaj kaj rasaj kaŭzoj praktikatan de registaroj diktatoraj ni ne tuŝas tie ĉi.

La lingvo-mistika opozicio al sindeza lingvo originas de la supozo, ke la diverseco lingva estas Dia volo, sekve ne ŝanĝebla de la homo. Aŭ ke lingvo estas io natura, ne apriorie kreebla de la homo. La argumento de la naciemulo, egale ĉu lingva ĉu politika, estas ke lingvo kaj nacio estas io ekster homa povo, kaj se jam devus esti ia idiomo por intergentaj rilatoj, ĝi estu tiu de forta granda nacio, kun ĉiuj atributoj imperiaj. Ekzemploj ne mankas en la homa historio kaj ne valoras ilin citi. Unu el la diktatoroj de lasta tempo, eĉ opiniis ke Esperanto povus fariĝi danĝera al la naciaj literaturoj.

Stranga estas sinteno de iuj personoj kontraŭ internacia lingvo pro la karaktero interfratiga. Argumento: Esperanto forigus la diversecon naciajn kaj kreus ian miksaĵon neniel dezirindan. Kaj la lasta el la kontraŭdiroj aŭ elturniĝoj por ne lerni Esperanton estas la frazo: "mi posedas la ĉefajn lingvojn, mi ne bezonas Esperanton." Ĉi tiuj personoj, se ili interesiĝas tamen pri nia afero, ofte ne bone lernas la lingvon, ĝuste pro troa memestimo, ke la posedo de pluraj lingvoj forigus ĉiun penon, serioze lerni gramatikon, sintakson, vortaron de la internacia lingvo.

Alia necitita opoziciulo estas tiu ne de ia argumento sed de homa trajto, nome, de la inerteco, aŭ por ne diri krude, maldiligenteco. Venki ĉi tiun kontraŭulon estas neeble. Ke aliaj humanecaj penadoj renkontas saman kontraŭstaron pro la inerteco homa, estas konstato sed ne konsolo!

Kiaj nun devas esti la sinteno de propagandisto, kontraŭ tia opozicio? Veteranoj kaj pioniroj inter ni bone memoras ankoraŭ la tempon, kiam ni devis kontraŭbatali la opinion, ke la malsama

parolmaniero, la akcento, k.t.p. komplikas la komprenon de Esperanto. Tio jam ne estas aŭdita nun, oni pli malpli scias, ke Esperanto funkcias kiel lingvo, ke oni bone interkompreniĝas, pli bone eĉ ol en nacia lingvo, servanta kiel peranto.

La lingvo-mistika argumento kontraŭ internacia lingvo estas facile forigebla. Ni ja ne deziras forigi la naciajn lingvojn, ni nur kompletigas ilin el ilia propra materialo. La lingva diverseco respondas ja al la homa diverseco kaj estas tiom intime ligita al la mistero de la mondo, kaj homa genio neniam forigos tion. Al la nacia argumento oni povas, kaj oni jam faras tion, atentigi ke la imperialismo de mondlingvoj ja vokas insiste trovi rimedon por ne tuŝi la pravigeblan senton de nacio. Ĝuste por protekti la naciajn lingvojn servas la helpa. Kontraŭ-argumento al la opozicio pro la interfratiga karaktero konsistas en tio, ke la internacia lingvo tiurilate kompletigas mirige la moralajn postulojn de la ĉefaj religioj kaj nombro da humanecaj movadoj tutmondaj.

Konklude de la supraj konstatoj estas, ke ja devas esti valorega ideo por kiu ne batalas, ĉar tiom da kontraŭuloj leviĝas kontraŭ ĝi. Ne ekzistas granda ideo, kiu ne devis lukti por esti rekonata. Ĝuste en la batalo mem montriĝas la valoro de la ideo. Aliflanke tiu ĉi opozicio montras al ni, ke la vojo al sukceso estas plena je ŝtonoj kaj dornoj.

H.J.

Difinoj

Amiko estas persono, kiun oni konas tre bone kaj kiun oni tamen amas.
Banko estas institucio, kie iu povas pruntepreni monon kondiĉe ke li povas pruvi la nebezoon.
Budĝeto estas inventaĵo ĉe kiu oni koleras antaŭe pri elspezoj, anstataŭ poste.
Ĉefo estas viro kiu venas je preciza horo en la oficejon, ĝuste kiam oficisto malfruas, kaj kiu malfruas kiam la oficisto alvenas ĝustatempe.
Envio estas la trotakso de la bonfarto de la aliulo.
Financoj estas krucvort-enigmoj por la ŝtato.
Kapitalo estas la mono kiun posedas la aliaj.
Konferenco estas la batalo pri majstreco en daŭra beloratoreco.
Kredito estas la konfido en monaferoj, kiun posedas tiu, kiu ne bezonas ĝin.
Rilatoj estas tio kiĉon oni opiniis posedi, antaŭ ol esti provinta ilin eluzi.
Sperto estas tio, kio postrestas kiam oni ĉion perdis.
Sukceso estas miksaĵo de bonŝanco, lerteco kaj senskrupuleco.
Virino partoprenas la ĉagrenon de la viro, duobligas la ĝojon, kaj triobligas la elspezojn.

Sveda socia strukturo kaj ĝia socia politiko Internacia kurso en popolaltlernejo

Arangita de Sveda Laborista Kleriga Asocio kaj Sveda Esperanto-Instituto, kurso okazos en la altlernejo de Viskadalen (apud Göteborg) de la 26-a de Junio ĝis 10-a de Julio 1949. Diversaj sindikatoj kaj oficistaj asocioj jam promesis doni monhelpon al la partoprenantoj nesvedaj per stipendioj. Tial certa nombro da nesvedaj kursanoj povos pasigi la tempon tute senpage en Svedlando. Svedaj partoprenantoj petu stipendiojn ĉe la loka grupo de A.B.F. Nesvedaj kursanoj eventuale povos peti monhelpon ĉe sia faka enlanda asocio por la veturkosto ĝis la Sveda landlimo.

Personoj, kiuj intencas partopreni la kurson, devas posedi iom da scio pri la koncernaj problemoj en la propra lando.

La programo estas dividita jene:—

1. La regado de la popolo per la popolo.
2. Instruado kaj edukado.
3. Koopera movado.
4. Popolaj parkoj kaj kunvenejoj.
5. Organoj de la labora merkato.
6. Ĝeneralaj sociaj prizorgoj.
7. Sveda gazetaro.
8. Prizorgo de kulturaj memoraĵoj.
9. Pri Svedaj arto, literaturo kaj muziko.
10. Studvizitoj ĉe fabrikejoj kaj institucioj, ekskursoj kaj festkunsidoj.

Detalojn (kiel eble plej frue) de Sveda Esperanto-Instituto, Tegelbacken, STOCKHOLM, Svedujo.

Tutmonda saĝeco

Malespero duobligas nian forton. (Angla)

* * *

Ju pli proksime de la osto, despli bone la viando. (Aŭstralia)

* * *

Kiu estas sana esperas, kaj kiu esperas posedas ĉion. (Araba)

* * *

Malantaŭ kapabla viro staras ĉiam aliaj viroj kapablaj. (Ĉina)

* * *

Dankemo estas la memoro de la koro. (Franca)

* * *

Grizaj haroj estas signo de l'aĝo, sed ne de la saĝeco. (Greka)

* * *

Porko aĉetita kredite, gruntas ĉiam. (Hispana)

* * *

Neniu miraklo daŭras pli longe ol tri tagojn. (Itala)

* * *

Laŭdu saĝulon malantaŭ lia dorso, sed virinon vizaĝ-al-vizaĝe. (Kimra)

PAĜO DE POEZIAĴOJ

La koro de Hialmar

de Leconte de Lisle

(Charles Marie Leconte de Lisle, franca poeto, akademiano (1818–1894) tradukinto de klasikaj antikvaj verkistoj, skribis interalie *Antikvaj poemoj*, *Barbaraj poemoj* kaj *Tragediaj poemoj*.)

Glacia vento, ruĝa neĝo, nokto hela.
Dormadas tie mil bravuloj sur la polvo,
Senmovaj, apud spado, kun okul' sencela.
Turniĝas super ili, krias nigraj korvoj.

La lun' malvarma ŝutas sian palan flamon.
Moviĝas Hialmar ĉe la mortintoj sangaj
sur klingostumpo, apogita per du manoj.
La ruĝo de l' batalo fluas el la flankoj.

—Ĉu iu havas iom da spirpov' ankoraŭ,
el tiom da ĝojplenaj knaboj, kaj fortikaj,
ridantaj kaj kantantaj, tiun ĉi aŭroron,
simile al la merloj en dornaĵoj dikaj ?

Ve ! ĉiuj estas mutaj. Armo havas truon,
rompiĝis kask', hakilo restas en riparo.
Okuloj miaj sangas, kaj senfinan bruon
mi aŭdas kiel hurlon de lupar' aŭ maro.

Ĉi tien, korvo brava hommanĝanto, venu,
malfermu mian bruston per la bek' el fero.
Nin vi retrovos morgaŭ tiel. Do forprenu
la koran varmon al filino de Ilmero.

En Upsal' kie grafoj trinkas la bieron
bongustan, frapas orajn kruĉojn, kantas ĥoron,
rapide flugu, erikeja marodero !
Al fianĉin' trovita, portu mian koron.

Ĉe l' supro de la tur' de korvoj vizitata,
vi vidos ŝin staranta, blanka, nigre hara,
je la oreloj pendas ringo delikata,
kaj pli ol luno, la rigardo estas klara.

Sciigu, nigra kuriero, mian amon,
kaj montru al ŝi mian koron, kaj ŝi vidos,
ke ruĝa estas ĝi, ne pala kaj sen flamo ;
kaj la filino de Ilmer por vi etridos !

Mi mortas. Jen spirit' el dudek vundoj fora.
Ho lupoj, trinku mian reĝan sangon ! Juna,
libera, ĝoja, brava kaj ne malhonora,
mi iras sidi inter dioj en la sunon !

Lucien Thévenin tradukis.

Revo demandanta

Pri kio sonĝas vi—infano nenaskita,
En dormo plejprofunda, neniam memorota ?
Ĉu pri patrina mammo kaj panja dolĉa voĉo ?
Ĉu pri la kruta voj' de l' jaroj, klopodegaj,
Ĝis fina vivofrukto—nobla korkuraĝ' ?

Aŭ pri tempo jam pasinta,
en kiu etsemero

Komencis krevi, kreski, strebi
Tra multaj vivoj, fariĝonte vi ?
Ho eta vi ! dormanta en utero,
Pri kio sonĝas nun ?

Pri kiu sonĝis, en la mondjuneca tempo,
Terglobo nia sen verdaĵ', kun mar' praŝlima ?
Ĉu nur pri ŝlimoverm' kaj pri limako pigra ?
Ĉu pri tiranosaŭro, dentegoj karnoŝiraj ?

Aŭ ĉu pri birdoj idonutraj ?
Abeloj ? hund' fidela ? —

Kaj homoj sur la voj' Dieca,
Ĝis sinfordono, kia de Jesu' ?
Pratempa mond' ! al kio vi celadis ?
Pri kio sonĝis vi ?

Kaj ho, Majesta **Vi**, kun nomo pridubata,
Sed kiun homa lang' plej ofte nomas Dio !
Ĉu sonĝis ankaŭ Vi ? En antaŭmonda tempo
Ĉu Vi konsciis Vin nur semo de l' estonto,
Kaj volis burĝonadi—animo de la mond' ?

Se tiel jes, Vi kion planis,
Dum monda praĥaoso,

Por esti idealo, bono,
Kaj celo de l' kreskanta mond'—kaj Vi ?
Kaj en celado Via, prakomenca,
Ĉu estis jame—ni ?

Respondas (ĉu vi aŭdas ?) de l' vivoflu' la voĉo :
“Divenu, homa kor', ĉar vi divenas prave.
El prakomenc' eteca ni ĉiuj kreskas kune,
Plej aĝa—Dio mem, kaj ni—pli junaj fratoj,
Al celo duonklara, duone en nebul'.

Do sonĝu en utero, mond' kaj homo !
Alvenke la naskiĝ' !

Neniam finfinote,
Sed jam ekeste, kreske,
Ĝi venos miksoĝoje, miksdolore,
Sed celatinge, lukte, glore,
Ĉar tia estas viv' !

Originale verkis Ernest Dodge.

TRA LA MONDO ESPERANTISTA

LA PETSKRIBO

En la fino de 1948 kaj dum la unua monato de la nuna jaro, petskrib-folioj—unuopaj kaj kolektivaj—daŭre superŝutis la Centran Oficejon. Tial ke tio koincidis kun la prema okupiteco rutina—kotizoj en tiu tempo lavange enfluas al ni—ni povis trakti nur parton de la amaso, kiu kuŝas antaŭ ni. Ni tial ankoraŭ ne povas doni finajn ciferojn; kaj pro tio, ke post la laste anoncita cifero ni intertempe enskribis proksimume **kvar milionojn** da subskriboj, ni resignas doni en la nuna numero detalojn, precipe pro la premo de materialo.

Ni tamen volas konigi al legantoj kelkajn elstarajn ciferojn. En la nuna momento—4.Feb.1949—la granda sumo de la kampanjo estas **14½ milionoj**! La unuajn ses lokojn okupas Germanujo (preskaŭ 7 milionoj), Japanujo (preskaŭ 2 milionoj), Ĉeĥoslovakujo (1 miliono), Nederlando (1 miliono), Britujo (750 mil), Norvegujo (500 mil).

Estas neverŝajne, ke okazos radikalaj ŝanĝoj en la nuna stadio, kvankam ni ricevas foliojn el malproksimaj landoj.

La sukceso de la kampanjo nepre pensigas, ke estus domaĝe tute rezigni pri la afero ĝuste nun, kiam la afero *varmiĝas* kaj ni volas fari sugeston, kiun pripensu la landaj asocioj, ke eble en la malpli vasta kadro de la landa propagando oni povus daŭrigi la petskrib-kampanjon, ne por UNO sed por prezento al la enlandaj oficialaj instancoj. Oni konsideru tiun gravan punkton!

Kongreso en Haarlem

La XVI-a Kongreso de L.E.E.N. okazos en Haarlem, Nederlando la 16–18 de aprilo 1949. La L.K.K. konsistas el: Prezidanto E. de Wolf; Sekretario W. ten Braake, Trompstraat 69 Haarlem; kasistino S-ino M. de Witte-Dijkman, kaj membroj A. de Witte kaj N. Vergunst. Kongreskotizo 3.00 g.

Kongreso de Germana Esperanto-Asocio

La 2-a postmilita Kongreso de G.E.A. okazos en Göttingen je Pentekosto 3-a ĝis 9-a de Junio 1949. G.E.A. komunikas la jenan informon:

Vizito de eksterlandanoj al la kongreso estos ebla. Germanaj samideanoj transprenos la vojaĝkostojn en Germanujo mem kun la restadkostoj de tranokto kaj manĝado, kondiĉe ke la partoprenanta samideano aŭ lia organizaĵo ebligas reciproke similan viziton al kongreso ekster Germanujo. Ankaŭ estos ebla la reciproka vizito de personaj amikoj. Organizaĵoj, grupoj kaj individuoj sciigu pri sia volonteco en tiu rilato al la Esperanto-Centro, Engelbertstr. 7, MÜNCHEN-Pasing (13b) Germ.

Persekuto kontraŭ Esperantisto

En la Februara numero de nia gazeto ni raportis pri la malpermeso de la kurso Esperanta en la Universitato de La Laguna, Kanario, kaj pri la mensogoj kaj kalumnioj direktitaj kontraŭ la Esperantistoj tie pere de la oficiala studenta gazeto *Arriba Espana*. La afero evoluis, kaj la elvolviĝo ilustras pli trafe ol kiu ajn argumento la veran staton de aferoj en tiu landparto. La dekanato de la Kemia Fakultato, D-ro J. Maynar Duplá, iniciatinto de la kursoj de Esperanto en la Universitato, kuraĝis publike kritiki la agon de la rektora moŝto, kiu ĉesigis la kurson. La rektoro, katolika pastro, ne volis toleri, ke subulo ne akceptu sen protesto lian verdikton, kaj proponis al la hispana ministro de Publika Instruado, ke li eksigu D-ron Maynar Duplá el lia posteno, kiel dekanato de la Kemia Fakultato. La ministro akceptis la proponon kaj la 31-an de Decembro, 1948 li eksigis S-ron Maynar. La Universitato zumadis, kaj ekscitiĝis, ke eminenta kaj honorinda persono, kia la dekanato, estis eksigita pro defendo de Esperanto.

Ni volas ĉi tie registri nian admiron pri la ago de ĉi tiu sinjoro—membro de U.E.A.—kaj ni estas certaj ke ĉiuj Esperantistoj kuniĝos kun ni en la espero, ke li ne suferas tro multe pro lia kuraĝo. Ĉiuj liberamaj homoj devas senti naŭzon, ke tiaj agoj povas okazi en nia mondo en la jaro 1948.

M.S.

Prepare por la Kongreso en Bournemouth

Post publika kunveno aranĝita de L.K.K. 43 personoj, inkluzive de la Vicurbestro kaj lia edzino, aliĝis al kurso gvidata de S-ro O. T. Nicolaisen. Al alia kurso aliĝis 34. Entute 400 personoj nun partoprenas kursojn en kongresurbo.

Finna samideano en eminenta rolo

En la registaro de Finnlando, starigita en Julio 1948, funkcias kiel ministro de sociaj aferoj nia malnova samideano kaj U.E.A.-fakdelegito, S-ino Tyyne Leivo-Larsson.

Provinca konferenco en Francujo

La fama kaj bela provinco Normandujo organizos dum la printempo (22-an de Majo) ampleksan regionan kongreson en Honfleur, ĉarma havenurbo. La Kongreskomitato tutkore bonvenigas partoprenon de eksterlandaj gesamideanoj. Informojn de: S-ro Hullin, Kongressekretario, 38 rue du Dauphin, HONFLEUR (Calvados), Francujo.

Paul Hofer:

LA LINGVO DE LA ABELOJ

(Kompilita laŭ prelegoj de D-ro Morgenthaler, direktoro de la Apikultura (Abelkultura) sekcio de la Agrikultura eksperimentejo, Bern).

Estas sciate, ke abeloj posedas ian sistemon por transdoni al siaj fratinoj en la abelujo la sciigon pri nove trovitaj nutraĵoj (nektaro aŭ poleno). Hazarde trovinte tian nutro-lokon la abelo ŝarĝita hejmenflugas en la abelujon kaj alarmas siajn kamaradinojn per strangaj dancoj. Baldaŭ tiuj ekscitiĝas, iretas ioman tempon post la dancantaron, per tio enmemorigante la al ĝi adherantan florodoron kaj finfine ili kuregas eksteren al serĉado de la koncerna nutraĵo.

La bazo de tiu nova fako de la apikulturo estas la konoj pri la abela flarsento, kies fundamenton jam antaŭ dudek jaroj ellaboris zoologia profesoro K. von Frisch, tiam en München, hodiaŭ en la Graz-a Universitato. Li montris, kiel abeloj posedas alte evoluintan flarsenton, kiu facile ebligas ilin rekoni la odoron de diversaj floroj, kaj plue, kiel tiuodoro de vizititaj floroj adheras al abela korpo dum longa tempo. Post florovizitado hejmenvenanta abelo kunportas la odoron de la vizititaj floroj en la abelujon; krome ĝi atentigas siajn fratinojn pri la trovitaĵo per speciala *varbdancado*. En siaj lastaj eksperimentoj Prof. von Frisch jam konstatis diferencojn inter tiuj dancoj kaj sukcesis ilin klarigi. Unufoje abelo varbas siajn labor-kamaradinojn per *rondo-danco* kaj instigas ilin al ekflugo. Per iretantaj paŝoj ĝi faras malvastajn rondojn sur la ĉelaro kaj faras ŝanĝojn unufoje dekstren kaj unufoje maldekstren. La danco daŭras proksimume minuton aŭ eĉ pli kaj estas ripetata je diversaj lokoj en la densa abelamaso. Kelkaj el la plej proksimaj abeloj sekvas la dancantaron interrilatante kun ĝi per la etenditaj antenoj (organo de palpa kaj aŭda sentoj). Tiamaniere ili ekkonas la odoron de la vizititaj floroj kaj elirante ili trovas la nutrolokon.

Alia danco estas la *vostuma danco*. La abelo faras duonrondon, rekuregas rektlinie al la deirpunkto, faras duonrondon al alia flanko, returniras denove al la deirpunkto k.t.p. Dum la duonrondoj ĝi kondukas same kiel dum la rondodancoj sed returnirante rektlinie, ĝi demonstracie *vostumas* per la korpa postaĵo. Komence la rondo-danco estis juĝita kiel danco de nektarkolektistino kaj la *vostuma* danco kiel tiu de la polenkolektistinoj, sed dum novaj eksperimentoj profesoro von Frisch konstatis diferencon inter la dancoj laŭ la distancoj de la abelujo ĝis la trovita nutroloko. Ĉiuj proksime kolektintaj faris rondo-dancon kaj ĉiuj malproksime kolektintaj faris *vostumdancon*. Sed

ne nur la distancoj de pli aŭ malpli ol 100 metroj estas montreblaj; montriĝas ankaŭ laŭregula ŝanĝo en la ritmo de la *vostuma* danco laŭ kreskanta distanco. Por distanco de 100 metroj ĝis la nutroloko la danco fariĝas per rapidaj turnoj; la mallongaj kaj rapidaj *vostum-marŝoj* ripetiĝas proksimume dekfoje dum kvarono de minuto. Ju pli granda estas la distanco al la nutraĵo, des pli malmultaj estas la turnoj de la *vostuma* danco. Ili malmultiĝas ĝis preskaŭ du dum kvarono de minuto por distanco de tri kilometroj. Kun la horloĝo en la mano oni trovas tiamaniere ĝis proksimume 100 metroj precize kie la dancanta abelo trovis la nutraĵon.


Sed la esprimeblo de la abela lingvo ne estas elĉerpita per tiu relative preciza distanc-informo; la elirantaj novuloj ricevas ankaŭ la direkton de la nutroloko. Laŭ von Frisch la abeloj posedas specon de suno-kompaso funkcia ankaŭ kiam la suno estas kaŝita malantaŭ nuboj. Tio estas rektlinia returno de la *vostuma* danco. Irante la returnon de sube ekzakte supren, la dancantino diras, ke la nutraĵo troviĝas en direkto de la suno, vidita el la abelujo. Krome, vertikala direkto de la returnmarŝo montras pozicion de la nutroloko kontraŭa al la sunsituo. Se troviĝas la alflugota celo maldekstre de la suno, la dancantino direktas sian *vostuman* dancon maldekstren kaj laŭ sama angulo uzota de la kamaradinoj por atingi la nutraĵon. Kontraŭe, ĝi marŝas dekstren se ankaŭ la nutroloko troviĝas dekstre.

Kun intereso oni atendas la detalan laboron de profesoro von Frisch kun la statistikaj pruvoj pri siaj eksperimentoj. Sed ankaŭ li ĝojus pri multnombra kontrolo flanke de bone observantaj apikulturistoj. La tekniko de tiuj observoj estas treege malkomplika (observo-abelujo kaj markitaj abeloj). Oni atentigas pri alia problemo, nur mallonge tuŝita de prof. von Frisch. Kiel la tielnomitaj esplorabeloj, elirinte el abelujo antaŭ ekflugo de svarmo, transdonas al la svarmo-abeloj la sciigojn pri trovita taŭga loĝejo, kaj kia estas la klarigo, laŭ kiu tuta svarmo en rekta linio alflugas la novan hejmon? Von Frisch diras: "Oni rimarkis dancantajn abelojn je la supraĵo de la svarmo. Laŭ mia opinio tiuj dancoj estas ne nur invito al ekflugo, sed ankaŭ preciza informo pri direkto kaj distanco de la alflugota celo, same kiel la dancoj de hejmenvenintaj kolektistinoj."

(Noto: Ekzaktajn observojn pri la okazoj antaŭ kaj dum ekforflugo de la abela svarmo oni sendu al Paul Hofer, abelbredisto, Haegendorf, Svislando).

TRA LA LIBRARO

*=akireblaj ĉe U.E.A.



Poliĥetoj de la *Michael Sars*
Nord-Atlanta profundmara
ekspedicio 1910. Esperanta
resumo de C. Støp-Bowitz,
Stensgt. 22b, Oslo 34,
Norvegujo. 1 rpk.

Ĉi tiu 4-paĝa folieto (grandformata) prezentas resumon en Esperanto de grava anglalingva verko, kiun la aŭtoro kontribuis en 1948 al la literaturo de la nomita ekspedicio. Por la plimulto da legantoj ekster la koncerna fako, ĝia intereso estos plejparte lingva—kaj tiun aspekton mi mallonge pritraktos. Unue tamen, estu dirite por la nefakulo, ke *Polychaeta* estas unu klaso de la strangaj (kaj kuriozaj) estaĵoj ofte nomataj *maraj vermoj*, kaj ke ilia nomo signifas ke ili posedas multajn haregojn—aŭ *ĥetojn*, por uzi la formon preferatan de la aŭtoro por la grekdevena scienca vorto *chaeta*. (Mi persone preferus *keto*, kaj *Poliketoj* por *Polychaeta*; sed tio nur flanke !)

La resumo listigas la multajn speciojn (vidu sube) pritraktitajn en la verko mem, kun mallongaj priskriboj pri kelkaj kiuj estas *novaj*. De la nomenklatura vidpunkto ĝi estas interesa, parte pro uzo de diversaj teknikaj terminoj (ekz. *elitra*, *pelaga*, *planktono*) ne ofte renkontataj de la ordinara leganto, sed ĉefe pro la fakto ke la aŭtoro ĉi tie provas la enkondukon de Esperantaj formoj por la nomoj de la individuaj specioj. (*Specio*, vorto uzata en la resumo, jam aperis en teknika literaturo por *speco* en la rigida botanika kaj zoologia senco; ĝi ebligas eviton de ambigueco en scienca verkado kaj parolado). Tiun procedon multaj legantoj kredeble opinios dubvalora, kaj mi konfesas, ke inter ili estas mi mem. Mi klarigu:

Estas bone kaj utile, Esperantigi—sed ne traduki—la sciencajn nomojn de Ordoj, Familioj, k.c. laŭ ĝisnuna praktiko: ekz. *Anelidoj*, *Karnivoroj*, *Koniferoj*, *Rozacoj*. Tiaj nomoj estas relative malmultaj, kaj ĉiu el ili konsistas el nur unu vorto: plue, ili jam estas internaciaj kaj enkondukeblaj laŭ Regulo 15 de nia gramatiko. La nuna *Poliĥetoj* (aŭ *Poliketoj*) estas plua ekzemplo. Ankaŭ estas ofte dezirinde, eĉ necese, simile Esperantigi *genrajn* nomojn, precipe kiam ili taŭgas por ĝenerala uzado eĉ ekster la precizaj sciencaj signifoj. Inter tiaj nomoj estas ekz. jam bone konataj *brasiko*, *korvo*, *krizantemo*, *lumbriko*, *strigo*.

Tamen estas tute alia afero, Esperantigi *speciajn* nomojn, kiuj ĉiam konsistas el du (kaj foje tri) apartaj vortoj—ofte malfacile tradukeblaj aŭ eĉ transliterigeblaj. Ĉiukaze la tasko sugestita

de la nuna aŭtoro estus timige grandega, pro la centoj da miloj da specioj jam klasigitaj de botanikistoj kaj zoologoj, kaj laŭnome akceptitaj tra la tuta mondo. Kiu kuraĝus entrepreni tian multjaran taskegon de Esperantigo? Kaj fine (se iam venus fino) ni havus nur du paralelajn listegojn de du-vortaj nomoj.

Plue, eĉ se la entrepreno estus malpli malfacila kaj tempokonsuma, aperus la demando de internacia akordo pri la novaj formoj mem. Por simple ekzempligi tiun punkton, mi citu la beston *leono*. Zoologie ĝi estas *Felis leo*: kaj *Felis* signifas (latine) *Kato*. Ĉu oni Esperantigu la nomon kiel *Kato leona*, aŭ konservu la malnovan genran nomon kaj diru *Feliso leona*? Sendube montriĝus multegaj malsimilaj opinioj pri tiaj punktoj tra la tuta specia nomaro. Eĉ por kelkaj el la ĉi tie Esperantigitaj nomoj estus facile sugestitaj alternativojn. Entute mi devas konkludi, ke malgraŭ la lerteco kiun la aŭtoro montris ĉe la nunaj ekzemploj, daŭrigo de la tasko de specia nomado en Esperanto neniel valorus la penon.

Verdano.

***Fabloj de Jean de La Fontaine**, versa traduko de Lucien Thèvenin. Eld. de Kompreni, Lyon; 82 p. 15×11 cm. broŝ. prezo 2 ŝil. 6p.

Studinte la francan—dum miaj infanaj jaroj—en la eldono de Hachette, de tiuj ĉi famaj fabloj, kun plezura kortuŝo mi trarigardis la nunan Esperantan eldonon. Mi retrovis, almenaŭ parte, la aspekton de tiu mia lerneja broŝuro, kun la samaj kliŝoj simpatie malnovstilaj; kaj nur duatempe mi rimarkis, ke la preso ne estas tiom bona kiom tiu de Hachette. La spacoj inter la versoj ne konstantas, la paĝordigo kelkfoje estas malplaĉa, kaj eĉ troviĝas titolo sur fino de unu paĝo kaj komenco de la koncerna fablo sur la alia (p. 49, 56), kaj male, senkiale blankaj duonpaĝoj; preskaŭ ĉiam malsamas la distanco inter fablofino kaj titolo de la sekvanta; la kliŝoj troviĝas jen post la titolo, jen ĉe la fino de la teksto. Strange, en tiu malordo mi tamen trovis malmulte da preseraroj.

La tuta aspekto estas modesta; oni estus ŝatinta pli belan veston por verko notinda kaj grava kaj altvalora, kiel tiu ĉi traduko de Thèvenin. La tradukinton ni konas el multaj poezioj aperintaj jam plurloke, kaj el ties volumo *La vana kanto*; sed li ankoraŭ pli plaĉas per tiu ĉi traduko, kiun li faris kun zorga amo, atingante simplecon pli grandan ol en siaj originalaj versoj (laŭ mi simpleco en Esperanto estas grandega kaj malfacile atingata virto, precipe en la poezio) kaj rimarkindan fidelecon al la franca teksto. *La cikado kaj la formiko* estu ekzemplo: la franca ritmo estas sekvata verson post verso, eĉ vorton post vorto. Oni konas la fablon en multaj

lingvoj ; mi certigas, ke en neniu el ili ĝi estas tradukita kun tiom da preciza, sindona fideleco.

La granda fideleco, ne permesanta vortkunmetojn, portas al ebena elvolviĝo de la versoj, sed tamen entenas ankaŭ danĝerojn, ekz. kiam—kiel ankaŭ Homero—Thèvenin dormetas, la fideleco portas al necerteco de esprimo *Multan birdon per Kaptilo oni prenis* p. 16 ; *Alprenos tiam vi decidon nun de certo* p. 15 ; *tempe kripligita* (ĉu *ĝustatempe, de la tempo?*) p. 40. Kelkaj francismoj ankaŭ devenas de troa fideleco kaj el ili la plej rimarkinda estas *ĉu ke* (p. 69) kiu spegulas la francan *est-ce que*.

Ĝenerale la lingvo estas bona kaj glata kaj vera poezia sento trakuras la tutan verkon ; nenio pli bona ol poeto tradukata de samlanda poeto.
C. Conterno.

Dokumento de la rezistado 1933-1945 ; Bildoj el la germana rezistado kontraŭ la naziismo dum la plej nigra periodo de la germana historio. 21×15 cm. 60 p. Esperanto-Centro, Hamburg-Gross Flottbeck, Im Hag 18. Prezo 2.20 g.m.

Kiu kulpis ? Jen la demando ripetita kaj ripetota dum ankoraŭ longa tempo. Por ni, kiuj observis kaj rigardis de pli alta starpunkto la evoluon en Germanujo, la respondo diferencas de tiuj kiuj rekte suferis pro la nazi-regado. Estas multaj faktoroj, kiuj allasis, ke stariĝu movado kun celo neniigi nian tutan kulturon kaj anstataŭigi ĝin per miksaĵo de moderna civilizo kun barbareco pasinta.

Alia demando farata estas, ĝis kia grado la germana popolo mem agis kontraŭ tiu ĉi teroro. Ankaŭ tiurilate la respondo ne estas simpla. Fakto estas, ke ekzistis rezistado, sed ĝi ne povis kunordigi siajn klopodojn. Junkroj, katolikoj, komunistoj, laboristoj, protestantoj, sektanoj plej diversaj, ĉio estis konglomero de elementoj ne kunigeblaj. Kaj ĉi tiuj elementoj ne estis eĉ cent-pro-cente kontraŭ, ĉar inter ili troviĝis multaj kiuj almenaŭ konsentis pri kelkaj postuloj de la naziteorio, ekzemple pri la ekspansio orienten je kosto de ĉeĥoj, poloj kaj rusoj.

Por ni Esperantistoj estas ĝojiga kaj neforigebla fakto, kiun oni devas ĉiam ripeti : la germanaj *Esperantistoj*, kun tre malmultaj esceptoj, rezistis. Certe ne ĉiu naskiĝis kiel konspiranto. Ekzistas ankaŭ alia formo de rezistado ; jam la helpo al persekutitoj germanaj estis rezisto !

La jena libro meritas esti konata inter ni kaj ni varme rekomendas ĝin. La kompilinto, Herm. Theobald estas sincera batalanto por justo kaj rajto kaj li meritas nian dankon pro sia agado dum kaj post la hitlera epoko. Konsilinde estas, ke dua volumo estu lingve reviziata. La uzo de kelkaj vortoj, ekzemple *ilegala* por *neleĝa*, ne estas rekomendinda.
H.J.

***Propagando de Esperanto** de D-ro Székely. Eldonita de Esperanto Film-Grupo (adreso supre); 25 paĝoj, broŝ. presita. Prezo 2½ ŝil. Ĉi tiu verko estas kompletigita formo de la propagand-plano ellaborita de D-ro Székely en la 32-a U.K. Ĝi enhavas multajn pripensindajn ideojn, sed ankaŭ troviĝas multo, kion ne povus akcepti serioza praktika laboranto. Tre multaj konsiloj, se ili estus praktikataj, rezultigus en iuj landoj la enkarcerigon de la propagandistoj. Facile estas indiki al aliaj homoj, kion fari, sed la plenumo estas tute alia afero. La aŭtoro tre naive ignoras ĉiujn financajn problemojn, la kernon de nia tuta propagando.

Gvidilo tra la Esperanto-Movado : G. P. de Bruin, Eld. S.A.T. kaj A.L.E. en Amsterdam. 16 p. broŝ. Prezo ne montrita.

Ĉi tiu *Suplemento* 1938-1948 (laŭ subtitolo) faras gravan kontribuon al la dokumentado de nia movado. Ĝi traktas mallonge la organizadon, gazetaron, literaturon kaj tendencojn en la Esperanto-movado kun malneta skizo pri la mondlingva problemo ĝenerale kun atentigo pri la nuntempaj projektoj. Papero kaj preso bonaj. Rekomendinda.

Ĉeĥoslovakio : bela, ilustrita gvidlibreto pri la Slovakaj montaroj. Eld. Direkcio por fremdultrafiko. Slovakotour, Bratislava, ĈSR.

11-12 Aarsberetning fra J. E. Ohlsens enkes plantepatologiske laboratorium : de Paul Neergaard. Ĉi tiu 19-paĝa raporto de la Plantpatologia Laboratorio de J. E. Ohlsens Enke, Kopenhago estas aparte interesa por la internacia legantaro pro tio, ke resumo troviĝas en la Angla kaj Esperanta lingvoj. Ni ne povas tro emfazi la valoron de tio, ke grava scienca entrepreno uzas flanke de la universala Angla ankaŭ nian Esperanton. Propagandistoj nepre atentu tion kaj ekspluatu tiun fakton !

Esperanto Wörterbuch : Germana-Esperanta Esperanta-Germana ; de Hermann Wagner ; Eld. Esperanto - Gruppe Stuttgart. 200p. bind. 15×10.7 cm. Prezo ne montrita.

Tre alloga kaj bone produktita eldonaĵo, kiu certe estas tre bonvena por niaj Germanaj samideanoj. En la fino troviĝas klarigoj pri la gramatikaj reguloj kaj informoj pri I.E.L. (U.E.A.) kaj S.A.T.

Ricevitaj : **Tekstaro de la Filmstrio 19/27. Danujo.** Esperanto Film-Grupo, Bergen-Op-Zoom, Nederlando. Prezo kun filmstrio : 15 ŝil.

Preĝo Nia Sinjoro kaj aliaj. Eld. Esperanto-Instituto Malnova Turo, Eindhoven, Nederlando. Prezo 0.10 g. aŭ 3 ekz. pro 1 rpk.

La babela turo

En nederlanda gazeto oni reprenis el la angla *Daily Herald* la sekvantan historion kiu okazis laŭdire en Ĝenevo. En tiu urbo oni okazigis kongreson por *libereco de preso*. Kvankam ĝi daŭris tri semajnojn, unu el la delegitoj, kiu tamen anoncis sin, partoprenis eĉ ne unu kunsidon. Oni serĉis lin sed lin ne trovis, nek en la kongresejo nek en la urbo. Fine li estis trovita en tute alia kongreso, nome la internacia konferenco de radio-teknikistoj, kies kunsidoj okazis en apuda konstruaĵo. La delegito estis vizitinta ĉiujn kunvenojn de la radio-kongreso en la firma konvinko, ke li estas progresiganta la liberon de parolo en la gazetaro! Li parolis neniun el la lingvoj uzataj en ambaŭ kongresoj!

Se la historio ne estas absolute vera, ne kulpas mi. Ĝi tamen ne estas nekredebla. Aŭskultu, kion mi mem spertis en kongreso de Unesco en Utrecht, okazinta antaŭ kelkaj monatoj. Nome de Asocio de Nederlandaj Scienculoj Esperantistoj ni ekspoziciis sciencajn esperantaĵojn dum tiu kongreso, en kiu partoprenis scienculoj kaj eminentuloj el multaj landoj. Unu el la profesoroj alparolis min, petante kelkajn informojn. Ho, ne ĝoju, ne en Esperanto! Mi kompreneble tamen volis helpi lin, sed ĉar li nur balbutis la anglan lingvon, per kiu li estis alparolinta min, mi diris al li france, "Eble vi preferus paroli france . . ." (la angla kaj franca estis la oficialaj lingvoj de la kongreso). Kun ektimo li rigardis min kaj diris: "What . . . y . . . y . . . you tell me?" (anglalingva balbutaĵo).

Estus ridige . . . se tio, kion mi diras, ne estus la vero.

Ankaŭ estas vera la jena: Partoprenis la *Ivory Cross Exhibition* en Nederlando, organizitan por konigi al la dentistoj la plej novajn metodojn de iliaj usonaj kolegoj, multaj nederlandaj kaj eksterlandaj dentistoj. Inter ili estis du sud-eŭropaj dentistoj kiuj ne povis kompreni la prelegojn, faritajn en la angla kaj la franca lingvoj. Por partopreni tiun *superan kurson* ambaŭ elspezis grandan monsumon kaj faris kelktagan vojaĝon! Inter la prelegantoj estis franco, kiu parolis tiel flue kaj rapide, ke la ĉeestantoj aŭdis kaj komprenis maksimume la duonon de la prelego. Kaj tamen multaj kleruloj (!) kaj multaj intelektuloj ne volas agnoski ke ekzistas nur unu solvo de la problemo: arta lingvo. Kaj la problemo jam estas solvita per Esperanto.

Chr. F. W. Slijper.

Vivante daŭre kun lamulo ci lernos lami. (Latina)


* * *

Manpleno da pacienco valoras pli multe ol kaldrono plena da prudento. (Nederlanda)

34-a Universala Kongreso de Esperanto

Bournemouth, Anglujo

6-13 Aŭgusto 1949



Adreso por leteroj: 34-a Universala Kongreso de Esperanto, Heronsgate, Rickmansworth, Herts., Anglujo.

Kongresejo: La Urbdomo, Bournemouth.

Kongreskotizoj: ĝis
31.3.49 poste

Kongresano	ŝil.	35	40
Edzo aŭ edzino de kongresano	ŝil.	17,50	20
Junul(in)o ne pli ol 20-jara	ŝil.	15	20

Kongreskarto: Tuj post ricevo de la aliĝo kaj kotizo, L.K.K. sendos al vi provizoran kongreskarton kun informoj kaj mendilo por loĝejoj kaj ekskursoj. Al informpetoj bonvolu aldoni internacian respondkuponon (Britoj, poŝtmarkon).

Glumarkoj: Mendu kaj uzu la belajn kongresajn glumarkojn. Por 6p. aŭ du rpk. oni ricevos folion da 20 glumarkoj.

Presaĵoj: Disdonotaj en la kongresejo aŭ en kongresaj kunvenoj devas esti aprobitaj de L.K.K.

Aliĝoj: Ĝis la 4-a de Februaro aliĝis 941 kongresanoj laŭ jena tabelo: Argentino 1; Aŭstralio 2; Aŭstrujo 2; Belgujo 15; Brazilo 2; Britujo 589; Bulgarujo 2; Ĉeĥoslovakujo 6; Danujo 10; Finnlando 5; Francujo 117; Germanujo 4; Hispanujo 1; Hungarujo 7; Irano 1; Irlando 8; Italujo 8; Jugoslavujo 3; Kanado 3; Nederlando 29; Norvegujo 21; Polujo 3; Portugalujo 1; Svedujo 74; Svisujo 19; Usono 8; (26 landoj) 941.

Konsilu al neniun iri en militon aŭ edziĝi.
(Portugala)

* * *

Dormanta vulpo nombras sonĝe kokinojn. (Rusa)

LA MILITO

Verkaĵo de lernanto

de Ludwig Thoma

(Ludwig Thoma (1867-1921) multlegita humoristo germana, redaktoro de la *Simplicissimus*, verkis en 1905 ĉi tiun skizon, en la stilo de lerneja temo pritraktita de lernanto.)

La milito (*bellum*) estas la stato dum kiu du aŭ pluraj popoloj provas ekstermi unu la alian. Oni konas la militon jam de la plej antikvaj tempoj kaj pro tio, ke oni legas tre ofte pri ĝi en la Biblio, oni nomas ĝin sankta.

En la antikva Romo la templo estis fermata, kiam la milito komenciĝis ĉar la dio Janus eble nenion volis aŭdi pri ĝi. Sed tio iel estas ridinda faro kaj jam estas forigita en la moderna tempo, en kiu oni ne fermas la preĝejon pro milito.

Oni konas religiajn militojn, konkirmilitojn, militojn por plibonigi la vivkondiĉojn, naciajn militojn kaj tiel plu.

Kiam popolo estas venkita kaj ĝi rekomencas militon, oni parolas pri *venĝa* milito.

En pasintaj tempoj religiaj militoj okazis plej ofte ĉar tiam la homoj volis, ke ĉiuj amu unu Bonan Dion laŭ la sama maniero kaj pro tio ili mortigis unuj la aliajn. En nunaj tempoj pli da komercaj militoj okazas ĉar la mondo jam ne estas tiom idealisma kiom ĝi estis antaŭe.

Kiam okazis milito en la antikva tempo, militis ankaŭ la dioj. Kelkaj el ili helpis unu flankon, aliaj helpis la kontraŭan. Tion oni povas ekscii el la eposo de Homero. La dioj sidiĝis sur la montetoj kaj rigardis. Kiam ili koleriĝis ili batis sin reciproke sur la kapon; sed nur la antikvuloj kredis tion. Oni devas ridi pri tio ĉar tio estis tre naiva kredo, ke diversaj dioj ekzistas, kaj kiuj militas unuj kontraŭ la aliaj.

En la nuna tempo la homoj kredas je unu sola Dio kaj se necese ili preĝas al Li, ke Li bonvolu helpi ilin.

La preĝantoj de ambaŭ partioj diras, ke Li helpas nur ilin mem, sed tio ne estas ebla, ĉar estas ja du partioj. Oni ekscias tion nur poste. La popolo, kiu estas venkita, diras, ke ĝi nur estas elprovita kaj ekzamenita.

Kiam la milito komenciĝas, sonas muziko kaj la homoj kantas sur la stratoj kaj ploras. Tion oni nomas himno. Ĉe ĉiu popolo la regnestro rigardas el la fenestro kaj la ekstazo eĉ pligrandiĝas. Tiam la afero komenciĝas kaj okazas la reala parto de la milito, tio, kion oni nomas batalo.

Je la komenco de batalo oni preĝas, poste oni pafadas kaj la homoj estas mortigataj. Kiam

la batalo estas finita la regnestro ĉirkaŭrajdas la batalkampon kaj informiĝas, kiom da homoj estas mortintaj. Ĉiuj diras, ke estas malgaja afero, ke tio devis okazi. Sed tiuj, kiuj restas sanaj, estas konsolataj per tio, ke estas ja la plej bela morto.

Post la batalo oni ree kantas himnojn kaj oni pri tio jam ofte faris pentraĵojn. La batalmortintoj estas enterigataj amase en grandajn tombojn komunajn, kie ili ripozas ĝis kiam la profesoroj elterigas ilin. Poste oni metas la uniformojn en muzeon, sed tre ofte restas nur la butonoj. La terenon, kie la homoj estis mortigitaj oni nomas *kampo de honoro*. Se iu eble pensas, ke estus pli bone se oni ne estus komencinta la tutan aferon, tiu estas malbona patrioto kaj li estas arestata. Poste venas la paco, en kiu tempo la homo mizeriĝas, kiel diras poeto Schiller. Precipe la invalidoj mizeriĝas ĉar ili ne ricevas monon kaj ili ne havas ŝancon gajni iom. Kelkaj el ili ricevas gurdon per kiu ili ludas patriotajn kantojn, kiuj entuziasmiĝas la junularon por ke ankaŭ ili forte batu kiam la afero denove komenciĝos. Ĉiuj, kiuj partoprenis la militon, ricevas rondajn medalojn, kiuj tintas, kiam la posedanto promenas. Multaj akiras ankaŭ reŭmatismon kaj fariĝas pedeloj de gimnazio, kiel ekzemple ĉe la nia.

Tial, la milito havas ankaŭ sian bonan flankon kaj montriĝas fruktodona.

Tradukis H. Petermann, Hagen.

Opinio-kontrolo en Hungarujo

La Hungara Popolopini-kontrola Instituto fariĝis novan esploron pri instruado de fremdlingvoj en lernejoj kaj konstatis, ke multaj deziras la Rusan lingvon. El la gepatroj tamen ĉiu dudeka esprimis deziron pri Esperanto. Laŭ sciigo de unu Hungara gazeto, Rusa sciencisto verkis detalan artikolon pri la gravo de la Rusa lingvo, kiu estas destinita funkcii kiel internacia lingvo! Estas neverŝajne, ke la laboristamasoj facile povos akiri tiun lingvon eĉ se oni instruos ĝin en la lernejoj.

Ekspozicio de Infan-desegnaĵoj

Nederlandaj *gesamideanoj* volas organizi ekspozicion de infanaj desegnoj en Amsterdamo. Oni precipe petas la kunlaboron de geinstruistoj ĉar lernejoj akompanataj de gvidantoj estos speciale invitataj al la ekspozicio. Por ĉiuj informoj oni sin turnu al lernejestro: C. Geurts EDAM, Nederlando.

Angla lingvo ne dezirata

D-ro Abdul Razek Sanbury Pasha, ministro de edukado en Egiptujo, informis, ke de nun oni instruu la francan lingvon kiel la unuan lingvon anstataŭ la angla, kiu estas instruita ĝis nun

Nia Felietono :

KAPTITOJ DE LA GLACIROKOJ

F. Omeĉka

(II. La atestanto : *daŭrigo*)

Li forlasis la kaŝejon kaj kuris renkonten al la soldatoj. Unu celdirektis al li pafilon kaj ekkriis :

“Haltu ! Manojn supren !”

“Mi estas Franco,” respondis Payen angle. “Via amiko.”

Malgraŭ tio la aviadistoj ne fidis al li. Estis ja tiom da Francoj, pri kiuj oni ne povis diri, ke ili estas amikoj de la Angloj !

Nur kiam li mallonge rakontis al ili pri siaj okazintaĵoj, ili fariĝis pli komunikemaj. Ilia aeroplano estis sendita el Anglujo por ia esplora tasko en Francujon. Post plenumo de la tasko ĝi flugis reen. Dum la transflugo de la fronto ĝi estis atakita per pafado kaj unu kuglo traboris la benzinujon. Antaŭ ol ili rimarkis tion kaj povis ŝtopi la malgrandan truon, la benzino plejparte elfluis. Ili estis devigataj alteriĝi.

“Se ni ne havigos al ni benzinon,” diris la piloto, “la aviadilo estos perdita.”

“Estu trankvilaj,” diris Payen. “Ĉi tie estas sufiĉe da benzino.”

Per komunaj fortoj ili alrulis grandan barelon da valora fluido al la aeroplano. Meĥanikisto preparis flekseblan tubon kaj kontaktigis ĉerpan pumpilon.

“Kia estas la situacio sur la fronto ?” demandis Payen. Li sciis la respondon jam antaŭe, sed li tamen devis demandi. Espero estas la lasta, kio homon forlasas.

“Katastrofa,” diris piloto.

La tri viroj rigardis sin senvorte. La ĉerpa pumpilo mallaŭte zumis. La horizonto sur la norda parto estis ruĝa. Sude minacis teruriga mallumo.

“Ĉu vi opinias, ke Francujo estos venkita ?”

“Ni vidis la germanan inundon kaj ne-imageblan teruron sur la ŝoseo. Tuta Francujo forkuras. Kien ? Armeo estas malorganizita. La Maginot-linion, la fieron de via strategio, la Germanoj evitis. Mi tre bedaŭras devi tion diri al vi, sed niaj sentoj ne povas ŝanĝi la realon : Francujo jam estas venkita. Post kelkaj tagoj, eble post kelkaj horoj, ĝi kapitulacos.”

Payen silentis. Tio ja estis super fortoj de viro, kiu amas sian patrujon.

“Ni faris eraron,” provis lin konsoli la meĥanikisto, “ni Angloj kaj ankaŭ vi Francoj. Ni suferas pro tio, ke ni ne sufiĉe taksis nian malamikon. Nu, ni bezonis ian skuon. Ruiniĝo de Francujo estas la lasta batego. Ni rekonsciiĝis. Ni havas pruvon, ke temas pri ĉio. Ni rektiĝos. Ni ekbategos.”

La pumpilo eksilentis.

La meĥanikisto rigardis la mezur-aparaton.

“Preta !” li diris.

Piloto donis al Payen la manon.

“Ni dankas vin, sinjoro. Kaj kio estos nun—pri vi ?”

“Pri mi ?” elspiris Pene Payen. “Do vi opinias, ke ĉi tie ĉio estas finita ?”

“Tio estas tiom certa, kiom ke mi estas Anglo.”

“Tiuokaze mi kompreneble . . . plej volus . . . flugi—kun vi.”

Mallonga konsulto de la britaj aviadistoj. Estas ja vero, ke la tasko de esplor-aviadilo ne estas kolekti izolitajn, forlasitajn homojn. Sed eksterordinaraj cirkonstancoj povas influi ankaŭ severajn ordonojn. Kaj krom tio—tiu ĉi Franco eble savis por la brita aviado unu aeroplanon kaj tre valoran materialon pri situacioj sur batalkampoj, kelkajn filmojn kun dokumentaj fotografaĵoj.

Tiun saman vesperon Marcel Payen estis en Anglujo. Sekvis milit-odiseo tra norda Afriko en Azion. Kiam alproksimiĝis la fino de la milito, li estis kapitano en Sirio. Li malmobiliziĝis tie, ĉar li volis returnvoje ekkoni Italujon kaj Svisujon. Hejmen li ne rapidis. Gepatrojn li perdis kiel infano kaj edzigita li ne estis. Gefratojn li ne havis. Kaj por renkonti la malnovan kunlaboranton Jean Daumal restis sufiĉe da tempo. Cetere, kiu scias, kio okazis al li ? Payen skribis al li tuj post la fino de la milito, ankoraŭ el Sirio, sed respondo ne venis. Eble li mortis dum la forkuro. Eble li estis arestita de la Germanoj kaj turment-mortigita en koncentrejo, kiel miloj da aliaj patriotaj Francoj. Kaj eble li estas ie en la eksterlanda armeo. Kiom da plej strangaj sortoj kreis la milito !

Payen estis jam dek kvar tagojn en Romo. Li vizitadis muzeojn kaj ekkonis la vivon de la urbo, kiu lin jam de studentaj jaroj allogis pro sia riĉa historio.

Kaj hodiaŭ

Sciigo pri Daumal superŝutis la sunhelan tagon per pezaj nuboj.

Marcel Payen malrapide trankviliĝis. Li direktis la paŝojn al la hotelo, en kiu li loĝis.

“Lasu transporti miajn pakaĵojn sur la flugejon,” li diris al la pordisto.

“Tre volonte, sinjoro Payen.”

“Komuniku al la hotel-direktoro, ke mi petas la fakturon.”

“Ĉu vi jam volas nin forlasi?” miris la pordisto, “Vi ja volis resti ĉe ni ankoraŭ dek kvar tagojn.”

“Jes, mi volis. Sed neatendita sciigo plirapidigis mian forveturon.”

La pordisto nenion pli demandis. Tiaj aferoj ofte okazas.

Marcel Payen iris al la flugejo. Ĉu estos malfacile ricevi lokon en aeroplano? Jes certe. Kaj tamen li ricevos ĝin. Li devas ĝin ricevi. Li devas iri sin prezenti kiel eble plej rapide ĉe la franca juĝistaro. Laŭ *Paris Soir* oni povas juĝi, ke la proceso verŝajne daŭros ok tagojn. La ĵurnalo havis hieraŭan daton. La hodiaŭa tago estas la dua. Restas do ankoraŭ ses tagoj.

Verdikton de la morto oni kutime plenumas tuj post ĝis eldiro.

Marcel Payen plirapidigis siajn paŝojn. Jam li estu sur la flugejo! Jam li estu en Francujo! Jam li povu paroli kun la defendanto de Daumal! Li ja estas la unusola atestanto, kiu povas savi senkulpan homon!

III. Super la Alpoj

Kiam Marcel Payen alveturis al la flugejo, estis la dekunua horo. En la flugstacio la vivo viglis. Vojaĝantoj alvenadis kaj foriradis, reciproke sin bonvenigis kaj adiaŭis. Oni parolis tie itale, angle, france, hispane, ruse, pole kaj la dio scias per kiom da lingvoj krome.

Payen iris al la ĝiketo super kiu pendis granda, okulfrapa surskribo: *Air de France*.

“Ĉu vi havas linion Romo-Parizo?” li demandis oficiston.

“Jes, sinjoro.”

“Kiam forflugos la plej proksima aeroplano?”

“Jen la flugplano. Ĉiutage je la dekdua. En Parizo ni estas je la deksepa.”

“Mi petas unu flugbileton.”

“Por kiu tago?”

“Por hodiaŭ.”

“Ĉiuj sidlokoj estas rezervitaj.”

“Do, por morgaŭ.”

“Mi bedaŭras, sinjoro, sed ĉiuj lokoj estas rezervitaj jam por kvin tagoj. Hodiaŭ estas la deksepa de Novembro, tial vi ne povas havi bileton por dato ĝis la dudekdua de Novembro.”

“Neeble! Mi devas flugi jam hodiaŭ. Temas pri grava afero.”

“Mi tre bedaŭras, sinjoro, sed tiurilate mi vere povas nenion fari por vi.”

La vizaĝo de Payen malheliĝis. Li komprenis, ke ĉiu vojaĝanto havas pretendon pri transporto nur se li havas pagitan flugbileton. Sed ĉu oni povus fari escepton? Ĉu li ne povus persvadi iun?

“Ĉu mi povus paroli kun la direktoro de via asocio?”

“Certe, sinjoro. La Direktorejo estas tuj apud la kasejo.”

Ĝi ja estis franca asocio, la direktoro certe komprenos ĉion. Kaj eble oni povos aranĝi la aferon tiel, ke la pakaĵoj, kiuj ne estas tre gravaj, restos ĉi tie.

La Direktoro havis viziton de iu angla generalo.

“Kion vi deziras, sinjoro?” li demandis post pardonpeto al la generalo.

Marcel Payen prezentis sin kaj demandis, ĉu li povus jam hodiaŭ flugi al Parizo. La direktoro rigardis la anglan generalon. Ambaŭ ekridetis.

“Vi havas feliĉon, sinjoro Payen. Jen sinjoro generalo . . .”

“Gibson,” prezentis sin la anglo.

“Sinjoro generalo Gibson mendis tri lokojn por la hodiaŭa flugo. En la lasta momento li sciigas nin, ke li bezonos nur du biletojn ĉar lia filino devas resti en Romo. Li do flugos nur kun sia edzino. Novan vojaĝanton—jam estas duono antaŭ la dekdua—ni en tiuj malmultaj minutoj malfacile akirus. Pro tio sinjoro generalo estus devigata pagi la flugbileton, kiu ne estus uzata.”

“Bonege!” kriis Payen. “Mi dankas vin, sinjoro generalo!”

“Nedankinde,” ridetis Gibson. “Efektive, mi devus danki vin ĉar vi savis al mi kelkmilojn da liroj. Vi komprenas . . . kiam homo havas filinon . . .”

Ankoraŭ feliĉe estis, ke Payen ĉe malmobilizo ricevis de sia regimento konfirmon, kiu lin rajtigis al libera traveturo en ĉiuj landoj de la aliancanoj. Se li devus prizorgi la vizon, tio certe okupus kelkajn tagojn.

Antaŭ la flugstacio staris grandega kvarmotora aviadilo de la tipo Amiot. Ĉiuj vojaĝantoj jam sidis sur siaj lokoj, krom Payen kaj Generalo Gibson kun la edzino. Post kiam ili sidigis sin, la piloto rigardis horloĝon. Ankoraŭ kelkajn minutojn.

Fine aperis oficisto el la flugoficejo. Li donis signon kaj la kvar motoroj ektondris. Kiam la aviadilo flugis alten la vojaĝantoj rigardis mal-supren. Ili vidis ravan panoramon de tuta Romo. Ĉiu elserĉis konatajn historiajn lokojn kaj adiaŭis al ili. Oni flugis laŭlonge de la marbordo. Maldekstre brilis la Tirhena marebenaĵo, dekstre troviĝis la Apeninoj.

Sendube post unuhora flugo, kiam ili estos sataj de la bela panoramo, komenciĝos en la aeroplano vigla konversacio. La kajuto por vojaĝantoj estis tiel bone izolita, ke la motoroj ne faris surdigan bruon, kiel en aliaj tipoj de aviadilo.

Marcel Payen ekobservis la ceterajn vojaĝantojn. Krom Generalo Gibson, lia edzino kaj stevardino,* estis tie tri usonaj soldatoj kaj tri civiluloj. Antaŭ li sidis nederlanda vendisto, kiu jam diris, ke lia nomo estas Bakker.

“Mi amas la aeroplanojn,” li ĵus diris al siaj najbaroj, “sed samtempe mi timas ilin.”

“Kial, sinjoro Bakker?” demandis la stevardino, ridetante.

“Tiu rapideco; ĉu vi scias, ke tio estas fabeleca,” respondis la Nederlandano vikle. “Imagu al vi la jenon: tagmeze en Romo, vespere en Parizo. La duan tagon en Amsterdam. Poste Praha, Beograd, Káhira, Kalkuto, Batavio, Tokio, San Francisco, New York! Kie restas la kompatinda Jules Verne kun sia *Vojaĝo ĉirkaŭ la mondon en 80 tagoj*? Sed kiam mi pensas, ke mi povus falegi de tiu alteco, brrr!”

“Ne timigu nin,” haltigis la torenton de liaj timigaj vortoj la stevardino. “Cetere, vi devus tiaokaze pensi pri malfeliĉo ĉiufoje, kiam vi eniras vagonaron.”

“Jes, ankaŭ tion mi faras.” li kapjesis fervore. “Pro tio mi ĉiam sidas apud la pordo.”

“Por ke vi povu elsalti, ĉu?” ridis soldato, kaj gaje tuŝegis lin.

“Jes. Elsalto estas la sola afero pri kiu mi ĉiam kalkulas.”

“Ĉu ankaŭ en aeroplano?”

“Kompreneble. Kaj mi diru al vi: se mi ne ricevas lokon apud la pordo mi ne flugas. Tion mi faris jam kelkfoje.”

Li efektive sidis ĉe la pordo.

“Kaj kion pri paraŝuto? incitis la soldato.

“Tion mi havas preparita,” diris Bakker kaj leviĝis por ke oni vidu, ke li vere havas paraŝuton fiksitan al la korpo.

La vojaĝantoj ridis, sed la vizaĝo de du aŭ tri ombretiĝis. La stevardino rimarkis tion.

* speco de kelnerino, servistino, kun ĝeneralaj devoj.

“Vi provas timigi nin, sinjoro Bakker,” ŝi interdiris. “Ni preferas aŭskulti pri viaj vojaĝoj.”

“Ho jes, pri tiuj mi volonte rakontos,” li konsentis kompleze. “Kompreneble, se tio ne maloportunos al la ceteraj.” Kaj li rakontis. Li estis unu el tiuj *globtrotuloj*, al kiuj la mondo ŝajnas tro malgranda kaj kiuj sentas sin tute hejme ĉie. Li vidis kaj travivis multon. Li sciis akre observi, kompari, taksi, kaj tial la tuta societo kun intereso sekvis lian parolon pri la postmilitaj cirkonstancoj en diversaj landoj.

Payen nur duone aŭskultis. Jen kaj jen li elpoŝigis la *Paris Soir* kaj legis la artikolon pri Daumal. Kia feliĉo, ke li aĉetis tiun ĵurnalon! Jam hodiaŭ vespere li elserĉos la defendanton de Daumal kaj klarigos al li ĉion.

Ili alproksimiĝis al Svisujo.

“Nun ni flugos pli alten,” atentigis la stevardino. “Preparu vin kontraŭ malvarmeto.”

En la malproksimo staris alpa montegaro kontraŭ la firmamento kiel murego.

“Je kia alto ni troviĝas, fraŭlino?” demandis Bakker.

“Je dumil kvincent metroj, sinjoro,” ŝi respondis senhezite. “Post nelonge ni atingos kvarmil kvincent.”

Payen estis kontenta, ke li povos rigardi la maron de montegoj en ilia pompa grandiozo, sed li estis seniluziigata. La Alpoj estis kaŝitaj de densa kovraĵo de nebulo.

La aeroplano flugis ĉiam pli alten.

“Domaĝe,” diris S-ino Gibson kaj rigardis sian edzon. Tiu senvorte levis la ŝultrojn. Nur post momento li diris: “Tio ofte okazas super la Alpoj. Cetere, la nebulnuboj povos ankoraŭ disiĝi.”

Ili ne disiĝis. Tute male. Ili leviĝis alten kaj ĉirkaŭis la aeroplanon. Oni povis rigardi maldekstren, dekstren, antaŭen aŭ malantaŭen; nenion oni povis vidi, krom blanko-grizo.

“Kiel en tunelo,” diris soldato, kiu sidis apud la Nederlandano.

“Kaj jam komencis eĉ neĝi!” kapjesis ĉagrene la komercisto. “Ke ni ne travivu neĝoblovegon!”

“La meteorologiaj informoj estis favoraj,” konsolis ilin la stevardino. “Ĉi tiu neĝbloveto verŝajne havas nur lokan karakteron, kaj certe ne daŭros longe ĝis ni havos ĝin malantaŭ ni.”

For forigi la enuon ŝi ekfunkciigis la radio-aparaton, el kiu eksonis melodia muziko. Estis ja stranga sento esti forportata je rapide de 300 kilometroj en horo kaj vidi nenion krom rigidaj vizaĝoj...

“Kiom alte ni nun estas?” denove demandis Bakker.

La stevardino rigardis tra vitra pordeto en la kajuton de la piloto kaj radiotelegrafisto.

“Kvarmil metrojn. Kaj ni ĉiam flugas pli alten.”

“Oni ja povas tion senti,” diris S-ino Gibson dum ŝi plialtiris sian vojaĝmantelon.

Dum kelka tempo ili flugis senparole. Nur la muziko mallaŭte sonis en la regula muĝado de la motoroj.

“En tia nebulo mi flugis jam dufoje,” komencis denove la Nederlandano, “kaj ambaŭfoje mi diris al mi, ke neniam plu . . .”

Li ne finparolis.

La aeroplano forte ŝanceliĝis kaj la vojaĝantoj estis elĵetitaj el siaj lokoj, kiel dum kunpuŝiĝo de vagonaro. La kajuto pleniĝis per doloraj kaj teruraj ekkrioj. La nederlanda komercisto malfermis la pordon kaj elsaltis. Sed neniu atentis lin.

Novaj puŝego, ankoraŭ pli granda skuo, kvazaŭ iu de malsupre frapegis per grandega martelo, kaj la aeroplano restis senmova . . .

daŭrigota.

INTERNACIA KONKURSO 1949

Komenciĝis la konkurso kaj eklaboris niaj membroj. La ĉi-subaj ciferoj indikas la ĝisnunajn sukcesojn. Estas rimarkinde, ke ses landoj jam atingis 50%. Tamen, aliaj landoj ne malesperu pro tio, ĉar la fino de Decembro estas ankoraŭ malproksima kaj multo povos okazi se oni eklaboras tuj por rikolti novajn membrojn. Tio helpas ne nur al U.E.A. sed ankaŭ al via landa asocio, precipe se per tiu laboro VIA lando fariĝos la gajninto.

Kompreneble, vi mem (ĉar vi legas ĉi tion) estas jam membro, sed ĉu vi iam konsideris la avantaĝojn de dumviva membreco. Kiel D.M. vi neniam bezonas timi la interrompon en la livero de la gazeto pro malfrua pago de la kotizo: ĉu vi ĝisvivis 100, la gazeto daŭre alvenos kiel ankaŭ la jarlibro. Povas esti ke vi pensas “Bone, sed estas certe ke mi ĉiam povos pagi la kotizon: ĝi ja ne estas alta”. Pri tiu lasta punkto ni devas konsenti, sed ĉu iu povas esti CERTA pri la ebleco fari ion estontece en ĉi tiu ŝanĝiĝema mondo? Kroma konsiderindaĵo estas la fakto, ke kvankam vi NUN povas pagi vian kotizon, la nestabilaj kondiĉoj en la mondo ne garantias, ke vi ĉiam povos. D.M.-kotizo, do, estas bona asekuro por la estonteco, kaj certigos al vi daŭran membrecon, kaj al U.E.A. la certecon pri via ĉiama apogo. Krome, 50 poentoj por nova D.M. estas grava helpo atingi, eĉ preterpasi, la vialandan kvoton. (Dumviva Membreco kostas 20-oble la MA-kotizon).

Stato je 31-a de Januaro, 1949

Lando	Kvoto	Poentoj	%
1. Portugalujo ..	700	535	76.4
2. Sud-Afriko ..	250	170	68.0
3. Svisujo ..	1400	895	63.9
4. Britujo ..	13000	7656	58.9
5. Egiptujo..	300	160	53.3
6. Urugvajo ..	250	130	52.0
7. Kanado ..	300	140	46.7
8. Germanujo ..	1600	715	44.7
9. Nederlando ..	5400	2325	43.6
10. Svedujo ..	4100	1780	43.4
11. Norvegujo ..	1300	560	43.1
12. Finnlando ..	2000	845	42.3
13. Nov-Zelando ..	900	365	40.6
14. Jugoslavujo ..	1600	590	37.0
15. Hungarujo ..	1800	640	35.6
16. Aŭstralio ..	950	310	32.6
17. Brazilo ..	2000	548	27.4
18. Irlando ..	300	80	26.7
19. Polujo ..	4000	1060	26.5
20. Usono ..	3000	765	25.5
21. Belgujo ..	1700	421	24.8
22. Italujo ..	1600	355	22.2
23. Argentino ..	900	195	21.7
24. Hispanujo ..	1200	155	12.9
25. Francujo ..	6200	679	11.0
26. Ĉeĥoslovakujo ..	5300	290	5.5
27. Bulgarujo ..	1600	80	5.0
Palestino ..	400	20	5.0
28. Islando ..	500	15	3.0
29. Danujo ..	3200	10	.3
30. Aŭstrujo ..	1000	—	—

Por ĉiu membro kiu pagas kotizon al U.E.A. por 1949 estas donataj poentoj laŭ la jena tabelo:

Asocia membro ..	1
Membro kun jarlibro ..	5
Membro-abonanto ..	10
Membro-subtenanto ..	15
Patrono ..	50
Dumviva membro (nova)	50

Al la aliĝinta Landa Asocio en la lando, kiu montros la plej bonan progreson dum la jaro kompare kun la fiksita kvoto U.E.A. donos premion £10 (175 svisajn frankojn). Ĉiu delegito en la koncerna lando ricevos libropremion.

Vintro 1948-1949

Ĉiu ago, ĉiu diro en la nova jaro estu paŝo sur la vojo al la tuthomaro. Ĉiu penso, ĉiu vorto al la samcelanto. Montru, kien nin konduku nia Esperanto. Kaj la kora komuneco en laboro, en espero diru al la geamikoj sur la tuta vasta tero, ke neniu staras sola sub la stelsimbolo; ĉar ĝi kreis komunecon de la BONA VOLO. Bondeziroj nun flugadas tra senlima spaco: fine regu sur la tero, BONO, VERO, PACO.

Oscar Bünemann

UNIVERSALA ESPERANTO-ASOCIO

Centra Oficejo : Heronsgate, Rickmansworth, Herts., Anglujo

OFICIALA INFORMILO

N-ro 214

4-an de Februaro 1949

DUMVIVAJ MEMBROJ

F-ino E. Olsson, St. Essingen, Svedujo.
S-ro Nassif Isaac, Giza, Egiptujo.
Sam-ino E. Isaksson, Koskullskulle, Svedujo.

PATRONOJ 1949

11. S-ino M. C. Gillett, Banbury, Anglujo.
12. S-ino A. L. Blacklock, Ipswich, Anglujo.
13. S-ro C. H. Toms, Freshwater, I.o.W., Anglujo.
14. S-ro B. Beckman, Strängnäs, Svedujo.

MEMBRO-SUBTENANTOJ 1949

92. S-ro H. Boffejon, Antwerpen, Belgujo.
93. S-ro F. Staes-v. d. Voorde, Bruxelles, Belgujo.
94. S-ro G. Skogstrøm, Drammen, Norvegujo.
95. S-ro W. Misiewicz, Radom, Polujo.
96. S-ino H. Denenfeld, Pruszcz Gdanski, Polujo.
97. S-ro J. Kucharz, Rzeszów, Polujo.
98. S-ro C. Linda, Jelenia Gora, Polujo.
99. S-ro W. Monarszyński, Września, Polujo.
100. S-ro F. Noworol, Rzeszów, Polujo.
101. S-ro J. Piatkowski, Wrocław, Polujo.
102. Pastro P. Pięta, Strazów, Polujo.
103. S-ro R. Sakowicz, Nowa Sól, Polujo.
104. S-ro E. Wasilewski, Prokocim, Polujo.
105. D-ro J. Payrebrune, Szamotuły, Polujo.
106. S-ro G. Bevan, Wrexham, Kimrujo.
107. S-ro W. O. Bishop, London, Anglujo.
108. S-ro W. Cunningham, West Wemyss, Skotlando.
109. S-ro H. G. Endean, Epsom, Anglujo.
110. S-ro F. L. Gadsby, Birmingham, Anglujo.
111. F-ino C. M. Glennie, Birmingham, Anglujo.
112. S-ro F. Harris, Bath, Anglujo.
113. S-ro J. T. Haxton, St. Andrews, Skotlando.
114. S-ro T. H. Ridpeth, London, Anglujo.
115. S-ro S. Bellatti, Battle, Anglujo.
116. S-ino E. Dickson, Letchworth, Anglujo.
117. S-ro J. Collier, Westgate-on-Sea, Anglujo.
118. S-ro E. V. Ahlin, Brovallen, Svedujo.
119. S-ro B. Gerdman, Stockholm, Svedujo.
120. S-ro N. G. Nilsson, Göteborg, Svedujo.
121. S-ro F. H. Bereterbide, Buenos Aires, Argentino.
122. S-ro H. C. Otheguy, Buenos Aires, Argentino.
123. S-ro M. Jakupović, Zemun, Jugoslavujo.
124. S-ro I. Povoden, Trbovlje, Jugoslavujo.
125. S-ro B. Rajšić, Zemun, Jugoslavujo.
126. F-ino E. Downes, Barry, Kimrujo.
127. S-ro O. Jones, Cardiff, Kimrujo.
128. S-ro E. Truba, Warszawa, Polujo.
129. S-ro J. Garbar, Polujo.
130. S-ro K. Raczek, Wrocław, Polujo.
131. S-ro J. Kominkowski, Dzierżonów, Polujo.
132. S-ino Z. Pelc, Rzeszów, Polujo.
133. S-ro J. Wojtas, Radom, Polujo.
134. S-ro W. G. Atkinson, Walton-on-Naze, Anglujo.
135. S-ino V. Goodfellow, Whitburn, Anglujo.
136. S-ro G. H. A. Turton, Huddersfield, Anglujo.
137. S-ro A. de Magalhaes Carvalho, Bebedouro, Brazilo.
138. S-ro A. Caetano Coutinho, Rio de Janeiro, Brazilo.
139. S-ro C. H. Dionísio, Foz do Iguaçu, Brazilo.
140. D-ro C. Domingues, Rio de Janeiro, Brazilo.
141. S-ro J. Dusausoy, Paris, Francujo.
142. S-ro R. Ligneaut, Orleans, Francujo.
143. S-ro H. Paquereau, Lorient, Francujo.
144. S-ino J. Trésorier, Berthelange, Francujo.
145. Sam-ino S. Carrfors, Bromma, Svedujo.

146. S-ro S. Nummelin, Ulvsunda, Svedujo.
147. F-ino H. Calífornia, Lisboa, Portugalujo.
148. D-ro G. T. Knol, Coevorden, Nederlando.
149. S-ro H. Ingham, Liverpool, Anglujo.
150. F-ino G. E. Cock, Christchurch, Anglujo.
151. S-ro E. P. Barratt Cocks, Stoke-on-Trent, Anglujo.
152. S-ro F. W. Crofts, Guildford, Anglujo.
153. S-ro G. D. Edwards, London, Anglujo.
154. S-ro J. C. Lloyd, Salford, Anglujo.
155. S-ro J. D. O'Dell, Lincoln, Anglujo.
156. S-ro F. C. Rudman, London, Anglujo.
157. F-ino E. Squire, West Hartlepool, Anglujo.
158. S-ino J. Ciświcka, Gdynia, Polujo.
159. S-ro J. Andrzejczak, Łódź, Polujo.
160. S-ro J. Duliasz, Radom, Polujo.
161. D-ro L. Jępiński, Gdynia, Polujo.
162. F-ino W. Kaiserówna, Łódź, Polujo.
163. S-ro S. Malek, Łódź, Polujo.
164. S-ro J. Michalik, Gdynia, Polujo.
165. S-ro T. Michalski, Radom, Polujo.
166. S-ro W. Odolański, Piotrków, Polujo.
167. S-ro J. Popławski, Poznań, Polujo.
168. S-ro J. Pujdak, Łódź, Polujo.
169. S-ro J. Rogozinski, Łódź, Polujo.
170. D-ro R. Soloniewicz, Zgierz, Polujo.
171. S-ino B. Stachowska, Gdynia, Polujo.
172. S-ro L. Temerson, Łódź, Polujo.
173. S-ro M. Krzesinski, Radom, Polujo.
174. S-ro J. Toczyski, Gdynia, Polujo.
175. S-ro K. Wende, Łódź, Polujo.
176. S-ino H. Amelin, West Byfleet, Anglujo.
177. S-ro E. Iglesias Nuñez, Buenos Aires, Argentino.
178. D-ro J. A. Quina González, Buenos Aires, Argentino.
179. S-ro L. Vasiljef, København, Danlando.
180. S-ro P. M. Mabesoone, Amsterdam, Nederlando.
181. S-ro F. V. Taylor, Albury, Aŭstralio.

DONACOJ : E. B. Johnson 7ŝ. 6p., H. P. Saunders 7ŝ. 6p., J. H. Murray 15ŝ., W. M. Goodes 11ŝ. 7p., W. A. Cather 2ŝ. 6p., J. Chesterfield 1ŝ., H. Bridger 7ŝ. 6p., F-ino R. M. Spencer 5ŝ., F. W. Hipsley 10ŝ., F. C. Rudman 5ŝ., H. Milsom 2ŝ. 6p., W. T. Watkins 2ŝ. 6p., Ges-roj E. Laurie 5ŝ.

STATISTIKO

Jen la stato de la membraro je la fino de Januaro, kaj ankaŭ por komparo, je la fino de Januaro 1948 :

	1948	1949
Asociaj membroj ..	1706	644
Individuaj membroj :		
MJ ..	340	270
MA ..	2110	1775
MS ..	178	179
Patronoj ..	18	14
DM ..	160	176
HM ..	55	56
	2861	2470
	4567	3114

Noto : Oni devus ne kompari la ĉi-suprajn ciferojn kun la ciferoj je la fino de 1948, ĉar ĉiam en Januaro ni rekomencas la numeradon de la membraro. Ĝusta komparo estas ebla nur kun la sama monato en la antaŭa jaro.

Atentu! Dum la kongresa periodo la oficejo en Rickmansworth estos fermita. Oni do bonvolu klopodi, ke korespondaĵoj ne atingu la oficejon dum tiu tempo. Antaŭdankon.

C. C. GOLDSMITH, *Sekretario.*

ESPERANTISTA VIVO

Naskiĝo

Kuijer. Al Ges-roj Kuijer-van Baar en Volendam, Nederlando, je la 27-a de Januaro 1949 naskiĝis filo Laurentius Theodorus Jozef. Sinceran gratulon.

Niaj Mortintoj

Ni sciiĝis pri la forpaso de la jenaj samideanoj. Al iliaj familianoj ni esprimas nian profundan kondolencon.

Ben-David, Jehuda, tragedie mortis en Negbor, Palestino 2-an de Novembro 1948.

Chilard, Lionel, delegito kaj dumviva membro en Versailles, Francujo, mortis la 6-an de Februaro.

Colléatte, F-ino A., en Saily-Laurette, Francujo la 3-an de Januaro 1949. Ŝi estis honora prezidantino de la grupo en Amiens. La Centra Oficejo gardas freŝan kaj varman memoron pri nia samideano pro ŝia zorga kaj metodo laboro por la Petskriba Kampanjo.

Ducommun-Droz, S-ino R., edzino de samideano Ed. Ducommun en Les Brenets, Svislando. "La lasta svisa esperantistino de l' antaŭa jarcento" kiel diras la mortanonco. Ŝi forpasis 78-jara 13-an de Januaro, 1949.

Olsson, E, Stockholm, Svedujo, 8-an de Nov. 1948. Doktorigis en 1938; li verkis anglalingvan tezon kun resumo en Esperanto. Ĉe la entombiĝo parolis en Esperanto samideano Julin.

Schmid-Amaler, S-ino F., edzino de Esperanto-pioniro svisa, Jakob Schmid, veterano de nia movado svisa. Januaron 1949.

Rockmann, Fritz, Magdeburg, mortis 24. Jan. 1949 atinginte 70 jarojn. Per li malaperis la lasta el la unuaj tre aktivaj membroj de U.E.A., aliĝinte tuj de la komenco en 1908 kaj speciale sin okupinte pri la fako Junularo. Profesia instruisto Fritz Rockmann donis sennombrajn kursojn, verkis lernolibrojn, kunlaboris en la tiama Germana Esperanto-Gazeto de Stark (aperinta en Magdeburg). Post la unua milito li eniris la Estraron de U.E.A. kaj servis kiel peranto inter la Centra Oficejo en Genevo kaj la presejo de *Esperanto* (ĉe la presisto Paul Göring). Pro la komplikaj de la transpago al ni, U.E.A. komencis la epokon de decentrigo kaj starigis oficejon en Magdeburg, gviditan de Rockmann honorofice. Modela laboranto, tre preciza kaj akurata, li plenumis tiun ĉi oficon ĝis la jaro 1934, kiam la reĝimo devigis ĉiujn instruistojn germanajn ekŝi el internaciaj organizaĵoj, egale kia karaktero aŭ tendenco.

Fritz Rockmann, bona germano senpolitika, ne aliĝis al la reganta partio kaj sciis tranaĝi la epokon 1933 ĝis 1945. Lia loĝejo estis parte detruita dum bombardado kaj li vivis mizere en tiu ĉi urbo plejparte detruita. Sed lia amo al nia afero ne toleris ke li restu neaktiva kaj li penadis restarigi U.E.A. laŭpove.

Regule korespondinte kun li, ni de tempo al tempo sendis al li nutraĵojn, de kiu parto eĉ ne alvenis. La 31-an de Januaro ni ricevis leteron de la filo el Nordhausen (Turingio) informantan, ke la patro estas tie kaj grave malsana. Ke li bezonas injekciojn de insulino. La letero estis datita 21.I.49. Ni mendis la medikamenton kaj samtempe provis telefoni kio estas ebla nun. Ne plu necesis la medikamento. Rockmann forpasis jam pasintan lundon. Al lia familio ni esprimas sincerajn kondolencojn. La memoro de tiu ĉi fidela amiko restas daŭre inter ni vivanta.

Hans Jakob.

ESPERANTO KAJ RADIO

Mallongigoj: I=Informoj, P=Parolado, K=Kurso

Ĉiutage	15.30-15.45	Praha. 1935m. kaj 31.41m. I.
	19.00-19.15	Paris. 41.21m. Radio-diffusion Francaise, 118 Champs-Elysées, Paris 8.
Dimanĉo	21.00-21.15	Praha. 49.92m. P.
	23.30-23.35	Budapest Kossuth. 549.5m. I. Hungara Radio, Budapest VIII, Bródy Sándor u.7.
Lundo	07.15-07.30	Sveda Radio. 49.46m., 31.46m. P. Sveriges Radio, Stockholm 7.
	11.30-11.40	PRG2 (Brazilo). 104m. P.
	15.15-15.30	Sveda Radio. 19.80m., 27.83m.
	21.50-22.00	Praha. 470.2m. Prelegoj, intervjuoj, teatraj scenetoj, kantoj kaj informoj. Radiostacio, Stalinova 12, Praha XII.
	22.00-22.30	Ĉeĥoslovakujo. 269m. kaj 325m. Verda Stacio. Arto-programo. (Nur la unuan Lundon de la monato).
	23.30-23.35	Budapest Kossuth (kiel je dimanĉo).
Mardo	01.15-01.30	Sveda Radio. 49.46m., 31.46m.
	14.15-14.30	München. 405m. kaj 48.70m. kaj Nürnberg 315.8m. K. (ĉiun duan mardon. Radio München, Kulturabteilung Rundfunkplatz 1, München, Bayern, Germanujo.
	17.55-18.00	Bern. 25.61m. kaj 48.66m. P. de D-ro Baur. Schweizer Kurzwellendienst, Neungasse 28, Bern.
	18.50-19.00	Sofia. 39.11m. P. Radio Sofia.
	20.45-21.00	Hradec Králové. 238m. (Krom la unua mardo).
	22.00-22.10	Ostrava. 259m. Radiostacio Ostrava, Bráfova 5 (krom la unua mardo de la monato.)
Merkredo	10.15-10.35	Paris. 431.7m. K.
	21.10-21.25	Warszawa III. 48.25m. I. Pola Radio, Warszawa, Koszydowa 8.
	23.30-23.35	Budapest Kossuth (kiel je dimanĉo).
Ĵaŭdo	17.45-18.00	Hradec Králové. 280m. Vychod-očky vysilač, Hradec Králové, Ĉeĥoslovakujo.
	17.45-18.00	Wien II. 31.05m., 41.81m. kaj 228.6m. K. I. Radio Wien, Argentinierstr. 30a, Wien IV.
	17.55-18.00	Bern. 25.61m. kaj 48.66m. P. de D-ro Privat.
	21.50-22.00	Praha. 470.2m. (kiel je lundo).
	22.00-22.10	Ostrava. 259m.
	22.00-22.15	Graz 338.6m. I. (nur la unuan ĵaŭdon de la monato). Radio Graz, "Esperanto Voĉo" Zusertalgasse 14/a, Graz, Aŭstrujo.
Vendredo	17.15-17.30	Graz (detaloj kiel ĉi-supre sed ĉiu vendrede).
	18.50-19.00	Sofia. 39.11m. P. Radio Sofia.
	23.30-23.35	Budapest Kossuth (kiel je dimanĉo).

Klarigoj—En la tabelo la horoj de la dissendoj estas laŭ la horsistemo de Greenwich. Por Mez-Eŭropa tempo oni aldonu unu horon. Ni petas informon pri necesaj aliigoj. La donitaj adresoj estas tiuj al kiuj oni sendu gratulleterojn kaj informojn pri ricevo.

ENIGMA KONKURSO N-ro 36

Solvojn oni sendu al S-ro P. H. Mooy, 106 rue Général Lotz, BRUSSEL-Uccle, Belgujo.

Solvoj de la enigmoj de Konkurs N-ro 34 :

N-ro 73 : Ventro malsana orelon ne havas. Ŝlosilvortoj : vertikale - ekvatoro - nepotismo - tabureto - romantiko - originala - marioneto - abrikoto - leksikono - simpatio - artiŝoko - tamburino - aerolito - organismo - radikala - epigramo - litografi - oportuna - nostalgio - numeralo - epilepsio - hidrogeno - angeliko - virtuoza - arkaismo - sinoptika.

N-ro 74 : Bonvolu en la ĉi-kuna tabelo uzi la numerojn 1, 2 kaj 3 por tri nomoj, 4, 5, kaj 6 por la profesioj de tiuj profesoroj. Plue uzu la numerojn 10, 11 kaj 12 por la tri aliaj nomoj, kaj 7, 8, kaj 9 por la profesioj.

1	2	3
4	5	6
7	8	9
10	11	12

Laŭ IV ni povas meti la zoologon en 7, la kemiiston en 9 kaj Jensen en 11. Laŭ VI tiam la astronomo sidas en 6. Laŭ X por Nansen nun nur restas 2 aŭ 10. Se Nansen sidus en 2, la fizikisto sidus en 8, kaj laŭ VII kaj I la medicinisto sidus en 4, sed tiam Jansen ne povus sidi flanke de la medicinisto (V), do Nansen sidas en 10. Laŭ X la fizikisto tiam sidas en 4. Laŭ VIII nun por Karlsen restas nur 1 (laŭ II kaj IX li ne povas sidi en 3 aŭ 12). Por la medicinisto nun restas 5 aŭ 8. Se li sidus en 8, Jansen sidus en 12 (laŭ V), la matematikisto en 5, kaj, ĉar Hansen neniam legas matematikajn librojn, Svenson tiam devus sidi en 2, kio laŭ VII kaj III ne povas esti, do la medicinisto en 5, la matematikisto en 8 kaj Jansen en 3 (laŭ V). Ni nun scias, ke Karlsen legas kemian artikolon, Nansen legas medicinan verkon kaj Jansen legas zoologian verkon. Restas do, ke :

Jensen povas legi astronomian aŭ fizikan verkon (I).

Hansen povas legi astronomian aŭ fizikan verkon (XII).

Svenson povas legi astronomian aŭ matematikan verkon (III).

Estas do certe, ke Svenson legas matematikan verkon, kaj do Svenson venas en 2 (III) kaj Hansen en 12.

Gajnis la premiojn post kontrolo de la 32-a konkurso : Pastro D. W. Robson (Brit.) 110p., S-ro I. Ekström (Finl.), 109p, S-ro L. M. Deane (Brit.) 97p.

	1	2	3	4	5	6	7	8	9
A									
B									
C									
D									
E									
F									
G									
H									
K									

Enigmo N-ro 77 : Krucvortenigmo.

Horizontale : A. 1. markrustulo (r) ; 6. spirmalsano (r). B. 2. arboj ne povas vivi sen ĝi (r). C. 1. konifera arbo ; 6. larĝa ombrita strato. D. 3. korpoparto. E. 1. danĝera rampulo. F. 3. ĉiu vegetaĵo ĝin havas (r). G. 1. fino de akvokondukilo (r) ; 6. aktoro devas ĝin koni. H. 2. malgranda komika muzika teatraĵo. K. 1. plej ofta elemento(r) ; 6. tiu de muso relative estas pli longa ol tiu de elefanto (r).

Vertikale : 1. A. juvelŝtono (r) ; F. severega. 2. B. la produkto de tiu popolo estas tre ŝatata. 3. A. kantaĵo ; F. legomo. 4. C. tiun de la U.E.A. vi havas antaŭ vi (r). 5. A. grava persono en Hispanujo. 6. C. allogi (r). 7. A. oni povas sidi sur ĝi ; F. prefere oni ne sidu en ĝi. 8. B. kompatindulo. 9. A. neklarvida (r) ; F. per ĝi mi ricevas la solvojn (r).

Enigmo N-ro 78 : Ella literoj de la vorto PALEOGRAFIO faru kiel eble plej multe da sesliteraj aŭ pli grandaj, oficialaj, nederivitaj substantivoj. Nur la literoj *a* kaj *o* do povas dufoje troviĝi en la sama vorto.

EN KELKAJ LINIOJ

Bat'a en Zlin : La nomo *Bat'a* fariĝis speco de sinonimo por ŝuoj fabrikitaj laŭ speciala plano simile kiel *Sunlight* por sapo. La urbo Zlin en orienta Moravio devus porti la nomon de tiu ĉi industriisto. Laŭ informo de la gazeto *Rude Pravo* dum decembro pasinta, la fabrikejaro de Bat'a (jam ŝtata propraĵo) nomiĝos de nun *Svět-uzinoj* (Svět=matenlumo). Laŭ peticio de la loĝantaro de Zlin, tiu ĉi urbo de nun nomiĝas Gottwaldov laŭ la nomo de la nuna ŝtatestro ĉeĥoslovaka Gottwald.

Sovetia scienca ekspedicio por esplori la Gobi-dezerton revenis pasintjare al Moskvo. Ĝin gvidis Profesoro Ivan Efremov. Kolekto de prahistoriaj skeletoj, inter ili de dinosaŭroj de ĝis nun nekonata speco, estis unu el la rezultoj de tiu ĉi ekspedicio.

La aleo de la vendo (Siegesallee) nomiĝis en Berlin monumenta strato konsistinta el 32 marmoraj skulptaĵoj el la prusa historio. La plimulto de ili estas tute detruitaj kaj tio kio restas trovos lokon en la muzeo de la Mark Brandenburg. Tiel finiĝas kreaĵo el la Vilhelma epoko pri kies arta valoro oni ĉiam disputis.

Alicio en Mirlando revenis hejmen. Tio ĉi *mondkonata libro* (*Aventuroj de Alicio en Mirlando*) estis verkita de matematikisto Charles Lutwidge Dodgson, verkanta sub nomo Lewis Carroll. La manuskripto de tiu ĉi treege populara verko estis akirita de amerikano por ne malpli ol 15 mil pundoj. Ĝi denove estis ofertata kaj aro da usonaj amikoj de Anglujo kuniĝis pretaj pagi ĝis 100,000 dolaroj. Por la duono de tiu ĉi sumo ĝi estas akirita kaj dediĉita kiel "esprimo de danko al Britujo pro ĝia persisto en la batalo por la libereco." Ĝi troviĝas nun en la Brita Muzeo. Tiel proksimume kvindek jarojn post la morto de la verkinto manuskripto revenis hejmen.

★

DIABLET' EN LA BOTEL'

de
Robert Louis Stevenson

Elangligis

Jozefo Seka

48 paĝoj : 1ŝ. 10p. aŭ 7 rpk., aŭfrankite

Eldonita en Germanujo

★

Mendu ĉe

UNIVERSALA ESPERANTO-ASOCIO
Heronsgate, Rickmansworth, Herts., Anglujo

★

NONI KAJ MANI

de
Jön Svensson

Tradukis
Paul van den Hövel

Rakonto pri la spertoj de du malgrandaj
Islandaj knaboj, kiuj perdiĝis sur la
vasta maro.

Bele presita sur bonega papero.
160 paĝoj

Broŝ. 2ŝ. 9p. aŭ 11 rpk. aŭfrankite

★

Mendu ĉe

UNIVERSALA ESPERANTO-ASOCIO
Heronsgate, Rickmansworth, Herts., Anglujo

SVISA ANTOLOGIO

Arthur Baur

Formato 23×16 cm.

Prezo: broŝ. 23 ŝil.

bind. 26ŝ. 6p.

aŭfranko 1 ŝil.

Sur 540 paĝoj la verko prezentas al la
leganto la altnivelan svisan literaturon.

●

Mendu ĉe

UNIVERSALA ESPERANTO-ASOCIO
Heronsgate, Rickmansworth, Herts., Anglujo

Ĉu vi jam legis la problem-romanon,

D-ro DORNER

de H. L. Egerrup ?

Se ne, aĉetu kaj legu ĝin nun !! Ĉie oni
pridiskutas ĝiajn problemojn !! Partoprenu
ankaŭ vi la pridiskuton !

“ . . . la verko estas interesa kaj vigla . . .
Nur fakulo estas kompetenta kritiki la sciencan
bazon de la verko . . . —*Esperanto Internacia*.

. . . La aŭtoro evidente posedas tute sufiĉan
fantazieron de romanverkisto—eĉ pli ol sufiĉan—
tiel streĉe kaj romantike li scias gvidi la temon . . .

. . . se la libro aperus en nacia traduko, ĝi
certe estus al sia eldononto brila sukceso.—

Suomen Sosialdemokratti.

Broŝ. 8 ŝil., aŭfranko 6p.

Mendu ĉe

UNIVERSALA ESPERANTO-ASOCIO
Heronsgate, Rickmansworth, Herts., Anglujo

Se interesa romano plaĉas al vi, nepre legu la libron

MORTO DE TRAJNO

de FREEMAN WILLS CROFTS

El la angla lingvo tradukis

MASON STUTTARD

256 paĝoj. Bindita 9 ŝilingoj, afranko 6p.

“La interesa krim-romano temas pri la perfido de sekretaj kunsidoj de la angla ĉefmilitestraro dum la dua mondmilito. La intrigo estas jena: kiel estas eble, ke la malamiko sciigis pri la sendo de valoraj valvoj per trajno kaj kiel li povis elreligi—feliĉe alian—vagonaron? Multaj homoj estas suspektataj, la kriminalista aparto, la fama Scotland Yard, funkcias grandskale kaj post lacigaj serĉadoj, dramaj kaj streĉaj luktoj oni malkovras ĉion.

La verko mem estas tre streĉa, ni povas ĝin nur rekomendi. Leĝi ĉi tiun libron estas vera ĝuo kaj tre instruplena travivaĵo, ĉar oni ekscias multon ne nur pri la krimesploro sed ankaŭ pri la aranĝoj, metodoj kaj malhelpaĵoj de la fervojista servo.”

Esperantista Slovaka

Eldonita de

THE ESPERANTO PUBLISHING COMPANY LTD.

Mendu ĉe ĝia agentejo en via lando aŭ ĉe

UNIVERSALA ESPERANTO-ASOCIO

Heronsgate, Rickmansworth, Herts., Anglujo

ENCIKLOPEDIA VORTARO

ESPERANTA-GERMANA

E. WÜSTER

Jen verko senparalela en nia literaturo. Ne nur vortaro sed ankaŭ serio de monografoj pri ĉiaj demandoj rilate al Esperanta gramatiko, vortaro, uzado. Wüster, kun aro de helpantoj, zorge kribris la Esperantan literaturon, kaj kun aparta detaleco la verkojn de Zamenhof; komparante, pesante, klasigante, laŭ pleneco kaj perfekteco preskaŭ nekredeblaj. ENCIKLOPEDIA VORTARO estas la frukto de tiu kolosa laborado, multthoma kaj multjara. La enkonduko estas unika studo pri Esperantologiaj principoj, la transskribo kaj formado de teknikaj terminoj, kaj similaj demandoj.

Ĝis nun aperis kvar volumoj, A-KOR, kaj tiuj estas nun denove haveblaj. La ekzistantaj volumoj estas mino de trezoro—trezoro iom kaŝita por tiu, kiu ne scias la Germanan lingvon, tamen eĉ por li elfosebla pere de vortaro, kaj ĝenerale sufiĉe komprenebla pro la multegaj ekzemploj Esperantlingvaj kaj mallongigoj tre plenaj kaj klarigitaj.

Ĉiu volumo kostas 15 ŝilingojn anglajn, afranko 6p.

Mendu ĉe

UNIVERSALA ESPERANTO-ASOCIO

Heronsgate, Rickmansworth, Herts., Anglujo